

1974 novembro

67-a jaro

n-ro 827 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vi trovos

Respektinda leganto antaŭ nelonge plendis, ke ni ĉiam pli ofte dum la lastaj monatoj aperigas artikolojn, kiuj, laŭ tiu leganto, "havas neniajn ligojn kun Esperanto". Ĉar li ne precizigis sian admonon, ni devis iom mediti por malkovri pri kio temas. Estas tre verŝajne, ke la admono koncernis artikolojn similajn al tiu sur la paĝo 185 de tiu ĉi numero (Kenjo abolas la anglan). Nu, estas malfacile produkti revuon, kiu plaĉas al ĉiuj. Ni ŝatas ricevi viajn opiniojn pri la revuo (antaŭ ĉio viajn riproĉojn), sed ni ne pretas cedi al la starpunkto de la menciita leganto, eĉ se respektinda. Kiam oni lastatempe starigas la demandon de plia malfermiĝo de nia revuo, interalie, oni celas ĝuste, ke ni traktu temojn similajn al tiu sur la paĝo 185. Ĉio, kio havas ligojn al la lingva problemo en la hodiaŭa mondo — havas ligojn ankaŭ kun Esperanto kaj estas temo interesa por revuo kiel la nia. Cetere, en ĉi tiu numero de la revuo vi trovos iom da — vi eble diros — akraj vortoj. Ilia celo ne estas denove ekpolemiki pri la traktataj temoj, sed meti finan punkton post tiujn demandojn.

Enhavo

- 181 Fondaĵo Canuto: Praktiki solidarecon (sm)
- 182 La hamburgaj eksigoj: Por ke estu tute klare, Demisia letero de prof. d-ro J. Régulo Pérez
- 183 Semajno de Internacia Amikeco: Ankaŭ en la Movado (Erik Carlén), La libro por la Libro-tago
- 184 Hamburgo, ĉu historia kongreso? Nur novaj akcentoj (d-ro Werner Bormann)
- 185 Kenjo abolas la anglan: Ne plu simie imitadi koloniistojn
- 186 Raporto de la Lerneja Administracio de Finnlando al la Eduka Ministerio de Finnlando: La realeco de aliaj
- 188 Nekrologo: S. Szathmári 1897-1974, Enciklopedio: Richard Henry Geoghegan (David Richardson)
- 190 Belartaj Konkursoj 1974, Originala Poezio (Tria Premio): Supren penetris frost' (Kuroda masayuki), Recenzoj ("Nuda inter lupoj", "Floroj sen kompar'", "Kantanta mia bird'", "Roseroj")
- 191 Ekslibrisoj de Mitko Bakalov
- 192 Laste aperis..., Matematiko per Esperanto: Ili nepre komprenos vin (prof. d-ro Blagovest Dolapčiev)
- 194 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago
- 195 TEJO-paĝo: La 18a Internacia Seminario de GEJ: "Internacia Vintra Universitato", La 31a IJK — kie? , JET aŭ TEJ?
- 196 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 199 Oficiala informilo
- 200 Anoncetoj

La kovrilo

Kopenhago estas nova metropolo de la malnova mondo! Ĝi estas intima urbo kaj ĝi promesas same tian atmosferon por la 60a UK. La vikingaj vokoj desur la kovrila bildo celas averti, ke la plej favora aliĝperiodo baldaŭ finiĝos. La tri ridetoj estas invitaj, ĉu ne?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: S. Milojević.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germ., tel. (040) 7 38 45 08.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegujo; tel. (472) 44 80 85.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B 3581 Achel, Belgio; tel. (011) 64 31 50.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B 4000 Liège, Belgio; tel. (041) 27 00 79.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino Flora Szabó-Felső, Várady A.út., H-7621 Pécs, Hungario.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m. 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 74 12.

Praktiki solidarecon

EN LA PLI NOVA HISTORIO de la Esperanto-movado oni malfacile trovas pli belan ekzemplon de la internacia solidareco, ol estas tiu, kiun donas la Fondaĵo Canuto, starigita en 1961, laŭ iniciato de la tiama aganta prezidanto de UEA, s-ro H.W. Holmes, memore al la nobla personeco de prof. G. Canuto. Kiel konate, la celo de la Fondaĵo estis kaj daŭre restas transponti la pagproblemojn kaj membri en UEA personojn el landoj kun transpagaj problemoj aŭ landoj en kiuj la vivnivelo estas tia, ke pago de membrokotizo al la internacia organizaĵo signifus "lukson" kaj atencoj al la persona buĝeto. Dum 14 jaroj, kiom longe ĝi ekzistas, la Fondaĵo Canuto estas la plej persista batalanto kontraŭ la ofte menciata "eŭropeco" de la Esperanto-movado, la plej sukcesa pledanto por la universaleco de UEA. Sen la Fondaĵo Canuto perdiĝus la tuta streĉa kaj nobla laboro, kiun dum 15 jaroj faradis s-ro M. Haudebine en Hinda Unio, la sukcesaj startoj de la Movado en Malio, Nepalo, Etiopio, la ekfloro, kiun ĝi nun spertas en Suda Koreo, Kolombio kaj Kubo, la siatempaj sukcesaj pledoj por Esperanto, kiujn faradis s-ro T. Sekelj, kaj tiuj, kiujn lastatempe efektivas s-ro T. Kaŭakami-Nielsen. Kiam oni en Hinda Unio revas pri sia man-



S-ro Ibrahim Tambura el Malio antaŭ kelkaj jaroj estis brila aganto sur la movada kampo. Reveninte en sian hejmlandon, li spertas izolitecon.

pleno da rizo, ne eblas tie paroli pri kotizoj kaj nenien kondukas plendoj pri "malapero" de la iamaj entuziasmuloj en tiu kaj similsortaj mondpartoj. Necesas helpi, ne sufiĉas lamenti.

Esperantistoj verŝajne malpleje kulpas pro la hodiaŭa ideologia disdiĝo de la mondo, kiu aliflanke aperas kiel unu el la ĉefaj financaj obstakloj de la sinnutranta internacia Movado. La transpagaj problemoj en la kazo de pluraj orienteŭropaj landoj kaj kelkaj landoj en aliaj mondpartoj disigas de la organizita internacia Movado landojn kun la plej granda membrokapacito kaj baras senperan partoprenon de la tiea membraro en internaciaj eventoj. Tiamaniere oni venas al nacia aŭ regiona fermiteco, kiu neniam montriĝis stimula kiam temas pri internacia, tutmonda organizaĵo. La Fondaĵo Canuto ofte sukcesis superi ankaŭ tiujn barojn kaj ankaŭ tiukampe mildigi la akutecon de la problemaro.

La fonto de la financaj rimedoj, kiuj enfluis la Fondaĵon, estis ĉefe subvencioj el la Propaganda Konto de UEA, kiu siavice nutris sin el la enspezoj de Universallaj Kongresoj, kaj unuopaj kontribuoj al la Fondaĵo. Okazis, ke dum kelkaj lastaj jaroj la kongresoj ne donis kontentigajn financajn rezultojn, kio laste kaj plej krude montriĝis ĝuste ĉe la Fondaĵo Canuto. Dekoj da membroj, kiuj en multaj kazoj intertempe komencis funkcii en la delegita reto de UEA, ne povis remembrigi dum ĉi tiu jaro — pro la manko de mono en la Fondaĵo. Se dum la lastaj jaroj ne ekzistus subvencioj el la kapitalo de la Institucio Hodler '68, la Fondaĵo Canuto apenaŭ sukcesus travivi la krizon. La jaro 1973 finiĝis por la Fondaĵo Canuto per la sumo de ĉ. 3 300 guldenoj, kio sufiĉis por membri 110 aktivulojn el la nepagipova aŭ pagbara mondoj. Ĉi tiu jaro minacas finiĝi per la sumo de iom pli ol 2 500 guldenoj, kio sufiĉas por kovri iom pli ol 60 membrokotizojn. Krome, la ĉi-jara subvencio de la Institucio Hodler '68 (2 000 gld.) estas strikte destinita por Azio kaj Afriko. Por kompari, ni memorigu, ke la unua ekzistojaro de la Fondaĵo finiĝis per preskaŭ 300 membroj por kiuj la kotizo estis pagita ĉi-maniere. Kio do okazas kun la solidareco en la Movado? Ĉu ankaŭ la esperantistoj komencas aliĝi al tiuj teoriumantoj je kiuj svarmas ĉi tiu mondo kaj en kies ĉiu frazo aŭdiĝas la vorto "solidareco", sed kiam oni en la praktiko devas pruvi ĝin, montriĝas, ke ĝi estis nur bela frostodesegnaĵo survitra. Oni devas praktiki la solidarecon en la Movado, ĉar oni tiamaniere restas samtempe kaj zamenhofa kaj moderne progresema. Ne klopodu kontraŭargumenti per inflacio, ĉar ĝi al granda nombro de niaj membroj tamen ne malhelpas loĝi en luksaj hoteloj dum la kongresoj, aĉetadi lede binditajn librojn, multekoste kompletigadi siajn kolektojn de "esperantaĵoj", patropreni ekskursojn, rondvojaĝojn, semajnfinaĵojn, aranĝojn, balojn, bankedojn kaj similajn okazojn por tosti al la solidareco de la homaro. Nu, anstataŭ tosti, oni praktiku la solidarecon. La Fondaĵo Canuto estas ideala maniero por tion fari.

Por ke estu tute klare

Kiam oni pri minoraj aferoj komencas uzi gigantajn adjektivojn, kiam pro onidiroj kaj antaŭjuĝoj kreigas artefaritaj krizoj, kiam oni pro propraj miskalkuloj malvenkas kaj poste pri tio klopodas kulpigi la tutan mondon, kiam la popolo rifuzas kredi, ke la reĝo estas vestita, — necesas tiam al kelkaj aferoj reveni klarlingve. Al tio ŝuldiĝas la fakto, ke ni ĉi tie denove traktas la temon de la hamburgaj eksigoj.

LA SEPTEMBRA, la prikongresa numero de nia revuo ne plaĉis al ĉiuj, nek tio estis nia celo, kvankam ni faris sufiĉe da klopodoj por trankvile trakti la hamburgan lafon. Oni atakis nin: unuj pro "troa laŭdado", aliaj pro "senhontaj piko", ligitaj al la samaj personoj kaj samaj temoj. Nu, tiajn reagojn al la redakcio estis normale eĉ atendi, kvankam ne estis agrable ilin sperti.

Traktante tiel amplekse kaj honeste (Ni almenaŭ celis tion!) la hamburgan temaron en la septembra numero de la revuo, ni konscie volis eviti inciton de novaj sterilaj polemikoj, kiuj dum sufiĉe longa periodo daŭris eĉ sur la paĝoj de nia revuo. Kvankam estas tro frue juĝi pri tio, ni esperas, ke ni tiurilate notis konsiderindan sukceson. Tamen, unu el la posthamburgaj temoj jam sukcesis krei sufiĉe dikan dosieron en la redaktejo kaj, se ni ne tuj ion entreprenos, ŝajnas al ni, ke la dosiero daŭre kreskos, sen tendencoj foje magriĝi. Jen, ni tial faras ion kaj publike malfermas la dosieron ĉi tie:

Temas pri la eksigaj leteroj, per kiuj kelkaj meritplenaj funkciuloj de la Asocio rezignis pri siaj taskoj en UEA. Tiuj eksfunkciuloj estas: s-ro R. Bernard, s-ro H.W. Holmes, prof. d-ro J. Régulo Pérez, s-ro J. Thierry, f-ino M.H. Vermaas kaj prof. G. Waringhien. Ĉiuj ĉi eksigoj estis, ne "kaŝitaj", kiel kelkiuj volas prezenti, sed klare anoncitaj en la septembra numero de la revuo (v. la paĝojn 143, 147, 149 kaj 155). La eksigo de la eksa Honora Prezidanto, s-ro H.W. Holmes, estis tiam anoncita kiel "intenco", ĉar en la momento de la finredakto ne ekzistis skriba dokumento pri tiu eksigo. Escepto tamen estas la eksigo de prof. Régulo, ĉar li mem kondiĉigis la ekvalidon de sia eksigo.

Sed, ĉiuj ĉi tie menciitaj eksigintoj postulis la aperigon de siaj eksigaj leteroj en nia revuo. Ankaŭ ni konsentas, ke estas facile argumenti iliajn rajtojn tiurilate, sed, ni aliflanke konscias, ke ne estas malfacile kontraŭargumenti tiun publikigon. Ĉar la menciitaj funkciuloj eksigis pro la samaj aŭ similaj kaŭzoj, ni kredas, ke kontentiga solvo estas nia decido en ĉi tiu numero aperigi la kompletan tekston de la eksiga letero de prof. d-ro Juan Régulo Pérez. Farante tiel, ni esperas unuflanke kontentigi la scivolemon de tiu parto de nia legantaro, kiu interesiĝas pri la afero, kaj aliflanke preventi, ke la revuo estu inundita de leteroj, kies enhavo ne kongruas kun la celoj de la Asocio, kies organo ĉi

tiu revuo estas. La aperigo de la letero de prof. Régulo neniel signifas, ke ni iel ajn aliĝas al la enhavo de tiu letero, kiun ni trovas bazita sur aprioraĵoj kaj antaŭjuĝoj.

Ankaŭ la eksprezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, sendis al la redakcio 4,5 paĝojn longan manuskripton, kies titolo estas "Esencaj kaŭzoj de mia eksigo". Li petis ĝian publikigon en la revuo. Trovante en tiu teksto nenion novan, konstatante, ke ĝi ripetas la akuzojn kaj donkiĥotaĵojn je kiuj svarmis la aprila ĉefartikolo de la sama aŭtoro, notante kun bedaŭro, ke prof. d-ro Ivo Lapenna bagateligas la novajn Komitato kaj Estraron de UEA — kaj tiamaniere ankaŭ la membraron de la Asocio, kiu ja elektis tiujn kaj tiajn

DEMISIA LETERO DE PROF. D-RO J. RÉGULO PÉREZ

Karaj amikoj kaj kolegoj,

Ĉar mi estas malkontenta pri la maniero kiel kreigis la voĉdona maŝino por la elektoj en Hamburgo kaj pri ties sekvaĵoj, kaj ĉar, aldone, kelkaj opinias, ke la elektoj de komitatanoj B, organizitaj de la antaŭa Estraro, estas nevalidaj, dum aliaj esprimis, eĉ prese, ke mi estis kandidato (alivorte: politika peono) de la antaŭa Prezidanto, mi troviĝas en tia situacio, ke mi ne sentas min kapabla pozitive kunlabori en la nuna aparato de UEA. Tial, per tiu ĉi letero mi demisias de miaj postenoj en la instancoj de UEA, nome: komitatano B, membro de la Komisiono por Internacia Ekzameno, profesoro de Internacia Somera Universitato kaj Delegito. La demisio ekvalidos en la momento, kiam tiu ĉi letero estos publikigita.

En la espero, ke UEA, per siaj novaj Estraro kaj Komitato, povos daŭre plifortiĝi kaj plifirmiĝi, mi kordanke adiaŭas la amikojn kaj kolegojn kun kiuj mi kunlaboris en ĝiaj instancoj.

Septembro 1974

J. Régulo

organojn —, ni decidis ne publikigi tiun tekston. Ni ankoraŭ restas ĉe nia pritakso de la graveco de prof. Lapenna (v. la septembran numeron), sed tio neniam celis signifi konsenton pri kvazaŭ sanktiĝinta rajto, kiun prof. Lapenna arogas al si — esti la sola defendanto de la neŭtraleco de UEA kaj la definitiva interpretanto de la asocia Statuto.

Tio ĉi ne estas revuo kies ĉefa tasko estus kontentigadi la ofenditajn dignojn de la eksaj funkciuloj de UEA. Ni ne opinias la paĝojn de ĉi tiu revuo la ĝusta scenejo por fintrakti ĉiujn personajn ofendojn kaj eĉ "krimojn", onidire, pri kiuj ja okupiĝas kaj okupiĝu la koncernaj sociaj institucioj. En la nuna momento, la ĉefa tasko de ĉi tiu revuo estas kunhelpi al la novaj organoj de la Asocio konservi la ĝisnunan kaj atingi pli

altgradan unuecon de UEA, ĉio ĉi en la intereso de la plua progresigo de Esperanto.

Fine — por ke oni ĉesu spekulacii tiurilate — necesas konfesi, ke la hamburgaj eventoj rezultigis apenaŭ 5 eksigojn el la membreco de UEA, kun klara indiko de la hamburgaj ŝanĝoj kiel motivo. Sed, la samaj eventoj rezultigis ankaŭ almenaŭ 5 realiĝojn al UEA, kun klara indiko de la samaj ŝanĝoj kiel motivo. Kaj, kio!? Kion oni volas? En la realo, ekzistas financa krizo de UEA, dum la t.n. organiza krizo ekzistas nur en la kapoj de tiuj, kiuj la Asocion — ĉar ĝi ne plu estas gvidata de ili — volonte vidus disfalanta kaj malintegriĝanta. Ankaŭ en la Esperanto-movado oni rajtas atendi iom pli da tiu kondutmaniero, kiun oni postulas de la sportistoj, senrigarde ĉu ili venkas aŭ malvenkas.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO:

Ankaŭ en la Movado

Multjara estrarano kaj vicprezidanto de UEA, s-ro Erik Carlén, estis siatempe la iniciatinto de la Semajno de Internacia Amikeco. Anoncinte sian retiriĝon el la Estraro jam antaŭ la elektoj en Hamburgo, li tamen kandidatis por la Komitato, sed ne estis elektita. Kiel li anticipe deklaris, tio ne ĝenis lin; li promesis ankaŭ plue aktivi laŭ siaj povoj. Antaŭ nelonge li private eldonis dekmilojn da glumarkoj pri SIA kaj donacis ilin al la sveda Movado. Konsentinte ankaŭ estonte funkcii kiel Komisito de la Estraro pri la Semajno de Internacia Amikeco, li sendis al ni ĉi tiun artikolon:

AMIKECO TRANS LIMOJ estas la vortoj, kiuj nin renkontas en la emblemo de la Semajno de Internacia Amikeco. Ili bone esprimas la sencon de la Semajno, sed ankaŭ la t.n. "internan ideon" en maniero, kiu ne sonas sektece.

Mi rimarkis, kiam mi prezentis al eminentaj neesperantistoj tiun ideon de "amikeco trans limoj", ke ili kutime eĉ kun entuziasmo akceptis ĝin. Pro tio ni esperantistoj, se ni vere eluzas la eblecon de SIA, povas ankaŭ reklami nian lingvon en la kadro de tiu aranĝo. (Intence mi evitas la vorton "propagandi".) Sed estas necese, ke la lokaj Esperantaj societoj, kiel ankaŭ la landaj asocioj, jam nun komencu prepari la venontan Semajnon de Internacia Amikeco (17a — 23a de februaro 1975), kun la celo atingi ankaŭ neesperantistan publikon. Jen propono: Aranĝu dum la

Semajno publikan junularan kunvenon kun muziko, parolado, kantado kaj ev. kafo aŭ teo. Petu subtenon de la komunumo aŭ urbo. Se ni devas montri, ke Esperanto vivas, jen unu maniero por tion atingi. Kiam ni parolas pri "amikeco trans limoj", ni kutime pensas pri landaj aŭ naciaj limoj. Ili ja plej ofte estas ankaŭ lingvaj limoj, super kiuj ni esperantistoj havas specialan eblon konstrui pontojn.

Sed ankaŭ interne de nia Movado ekzistas limoj. Mi ne pensas pri politikaj kaj religiaj, sed pri limoj sole personaj. Ili konsistas el malŝato, eĉ malamo kontraŭ iu aŭ iuj, aŭ streĉiteco inter esperantistoj pro ofendoj, veraj aŭ nur imagitaj, pro klaĉado k.s. Tiaj limoj estas vere malutilaj kaj ni nepre forigu ilin. Per iom da pardonemo, afableco kaj homamo tio eblas. Donu la amikecan manon ankaŭ trans tiajn limojn. Ĉu vi rimarkis la plej gravan parton de la vorto "amikeco"? Tio estas ĝiaj tri unuaj literoj. Ni praktiku! Ĝuste nun estas tre grave por la Movado, ke ni ĉiuj montru reciprokam amikecon kaj fidon.

Erik Carlén

LA LIBRO por la Libro-tago

"ESPERANTO EN PERSPEKTIVO" estas preta. En la momento de la finredakto de tiu ĉi numero, la monumenta verko de CED estas jam komplete presita, ĉiuj 876 paĝoj, el kio 65 paĝoj da ilustraĵoj kaj 40 paĝoj da indeksoj tema kaj persona. Komence de decembro estos disponigebla la unua kvanto de cento da binditaj ekzempleroj. La libro estas jam nun mendebla ĉe UEA. Prezo: 84,— (por Nederlando 87,36) guldenoj, plus 10% por la sendokostoj.

Nur novaj akcentoj

LA 59a UNIVERSALA KONGRESO de Esperanto en Hamburgo estas ĝis nun distingita per multaj adjektivoj, inter kiuj elstaras la epiteto "historia". Por brili en tia honoro, la Kongreso devus signi epokfinon, gravajn ŝanĝojn kaj novan periodon. Ĉu en Hamburgo trakforko estis ŝaltita? Evidente parto de la personaro kondukanta la Esperanto-trajnon ŝanĝiĝis, sed multo restis. Vakajn postenojn en la lokomotivo transprenis konataj konduktoroj, kiuj aliloke jam pruvis sian kapablon. Restis la ensidantoj de la trajno: la esperantistaro, organizita en UEA kaj arigita ĉirkaŭ ĝiaj instancoj — komitato, estraro; restis la vojo sur kiu ni strebas al nia celo. Nenio do pravigas la epiteton "historia". Kvankam estus honorige por hamburgano, ornamu sian kongreson per ordena rubando, tiu elstarigo ne estus meritita: la okazintaĵoj ne ŝanĝis la malnove kutiman linion.

Tiel la Universala Kongreso en Hamburgo nun enviciĝas normale post siajn 58 antaŭulojn kaj, kiel ili ĉiuj, ankaŭ ĝi donis al ni novajn spertojn. Kelkaj evoluoj reliefigiĝis en Hamburgo ĝis klareco: malagrablaj ŝokoj, kiel ekz. la deficito aŭ la bonaj tendencoj malfermi la Asocion de limigita esperantismo al aktiva partoprenado en la lingvopolitikaj disputoj. (V. mian artikolon "La 50-procenta regulo" en tiu ĉi revuo, n-ro 6/1974). Prijuĝo de la lernaĵo, akirita en Hamburgo kaj decida por la plua irado, permesas vidi la 59an UK en la ĝustaj mezuroj. Resume: Kio grava estas anoncenda el Hamburgo?

Centreco intence malfortigita

La timiga deficito de UEA estas la ekstere videbla vundo de principa perturbo. Grandan pecon el la financmaso de la Asocio eltranĉas la Centra Oficejo por kovri siajn kostojn. Deziro venki super niaj monaj problemoj tiel necesigas reekzamenon de la taskoj de tiu oficejo. Ĝi estas serva entrepreno, kaj nuntempe servejoj daŭre plikostiĝas kontraste al produktoj, kie laborŝparaj maŝinoj tenas la kostojn malaltaj. La ĝenerala kosteksplodo de servocentroj ne estas egaligebla per sufiĉe altaj kotizoj. Do ni devas adiaŭi al la komforteco de periodo, dum kiu regis vaste la agrabla sento: Ja la C.O. plenumos Tro da laboro plenkŝtopis tiun fonton de helpoj.

Sed Esperanto postulas, ke la laboro estu farata. La giganta tasko, konstrui briko post briko la ponton al mondvasta kompreno per internacia lingvo, bezonas amason da plenumantoj. Iuj nur enmasonas unu ŝtonon, aliaj enveldas ŝtaltrabon; esence estas, ke ĝeneraliĝu la scio: ne ekzistas iu "oni" por ĉion fari. Ĉiu agu mem.

Sur nia vojo al pli forta akcento de la principo de plurismo la kongreso en Hamburgo signifas mejloŝtonon. Tiu strukturo havas sian tipan fluon de komisioj. Aliaj organizaj principoj, ekzemple la demokratia centralizismo, disponas pri pli rektaj internaj rilatoj, ekzemple de forta gvidanto al sia oficistaro. Ni nun devos alkiutimiĝi al multfaceta Movado; alie ne eblas stimuli la pretulojn ekagi. Tia organiza skemo kun pli malrektaj linioj devas eviti sian danĝeron: sen-direkta drivado. Batalanta movado bezonas celkonscian marŝadon. Tial la tegmenta funkcio de UEA estas nun eĉ pli grava, kiam pli da kunordigo aldoniĝas al la direktado.

Reliefigo en lingvopolitiko

Nia pozicio estas daŭre bona: la monda lingvo-problemo altiras la atenton de multaj gravuloj. Antaŭ kelkaj jaroj tre multaj el ili neis la ekziston de politikaĵo lingvo; maksimuma koncesio estis la trankviligo, ke la angla jam solvis ĉion. Nun la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj de FR Germanio skribis al mi, ke Eŭropo lingve "helvetiĝos" — kio evidente signifas, ke pluraj lingvoj estos internacie uzataj. Tiu ĝenerala problemo de la monda politiko estas nia kampo: ĉio pri lingvoj en internaciaj rilatoj. La plej fundamenta rekono de la rango posedata de tiu problemo troviĝas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tie estas listigitaj 10 kriterioj, en kiuj diskriminacii signifas peki kontraŭ humaneco: raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika opinio, nacia deveno, socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo. La malavantaĝoj de la diskriminaciitaj homgrupoj estas tiel bone konataj, ĉar la bataloj plurloke ankaŭ nun daŭras. Agante sur



Novaj akcentoj: Dum unu el la komitatkunsidoj en la kadro de la 59a Universala Kongreso en Hamburgo.

la kampo de lingva hegemonio kaj lingva diskriminacio UEA enviciĝas inter multrespektataj batalgrupoj kaj ĝi samrangas kun aliaj monde gravaj organizaĵoj. Tiun fakton ni devas ĉiam denove projekcii antaŭ niajn okulojn, alie — ni mem forprenas esencan parton de nia signifo. Ja ni estas Universala Esperanto-Asocio, sed ni ankaŭ povus nomiĝi Asocio por Kontraŭbatali Lingvan Diskriminacion, aŭ en pozitiva eldiro: Asocio por Lingva Egalrajteco. Tia grupiĝo havas pli larĝan fundamenton ol pura esperantaĵo, ĉar la nombro de homoj interesitaj pri tiu aspekto de la monda politiko certe estas pli granda, ol la nombro de aktivaj esperantistoj. Kvankam nur la scipovo de la Internacia Lingvo ebligas facilan tutmondan komunikadon inter la kontraŭbatalantoj de lingva diskriminacio, povas kontribui ankaŭ homoj, kies lingvoscio ankoraŭ bezonas poluradon. Ni estu malfermita asocio, se temas pri nia afero, ĉar ni tiel plifortigos la premgrupon, kiu asistos al ni esperantistoj en nia postulado ĉe oficialaj instancoj.

La influo de la Hamburga Kongreso sur la ĝeneralan linion, laŭ kiu ni progresas, sin tenas en la kadro de konataj argumentoĉenoj. Tiu karaktero pravas la kontinuan pluevoluon en nia laboro. Restas nia ĉefcelo la antaŭenpuŝo de Esperanto, sed niaj labormanieroj adaptiĝas al la novaj postuloj. Ĉio alia estus stagnado. Tiu minaco ekzistas ja ne nur rilate kvanton, sed ankaŭ koncernas la agmanieron. En la nuntempa mondo multaj sintenoj ŝanĝiĝas: scienciĝo en ĉiuj argumentadoj, malstreĉiĝo en la politikaj rilatoj, komfortemo de la homoj ĝenerale pro alkutimiĝado al helpiloj, novaj interesoj de ekskoloniaj popoloj, alia konstelacio de la potenco en internaciaj organizaĵoj. Ĉio ĉi ne povas preteriri apud ni esperantistoj sen lasi spurojn ankaŭ ĉe ni. Modernigo de nia labormaniero sekurigas al ni kuniri en la evoluo. Tion ni scias nun, kiam ni registras la 59an UK en la historio de la Movado!

D-ro Werner Bormann,
vicprezidanto de UEA

KENJO ABOLAS LA ANGLAN:

Ne plu simie imitadi koloniistojn

ĈIAM PLI OFTE dum la lastaj jaroj, ankaŭ en la Esperanto-movado oni komencas konscii, ke la lingvo ĝenerale havas ne nur kulturan kaj socian dimensiojn, sed ankaŭ tiun, kiun oni ankoraŭ malkuraĝe nomas la politika aspekto de la lingvo. Ne, certe ne temas pri iu nova “atako” al la neŭtraleco de la Movado, pri prefero de unu aŭ alia reĝimformoj. Temas ĉi tie pri esprimo de senrezerva simpatio al pluraj klopodoj de novaj, kaj relative novaj, ŝtatoj en Afriko, kiuj komencas kompreni, ke ankoraŭa lingva kaj kultura dependeco de iliaj iamaj koloniaj metropoloj estas pereige danĝera mino en la konstruaĵo de ilia sendependeco. La ekzemplo de Kenjo estas sufiĉe klara tiurilate.

“La bazo de ĉiu sendependa registaro estas nacia lingvo. Ni estas sendependa nacio kaj ni ne plu povas daŭrigadi la simian imitadon de niaj antaŭaj koloniistoj.” Per ĉi tiuj vortoj la prezidanto de Kenjo, Ĝomo Kenjata, dekretis, la 5an de julio ĉi-jare, ke la svahila lingvo anstataŭos la anglan kaj fariĝos la nacia kaj oficiala lingvo de Kenjo.

La dekreto efikis kiel surprizo ĉe kelkaj tavoloj de la kenja socio, argumentantaj, ke la anonco pri la anstataŭo venis “tro haste”. Tamen, plimulto ne estis surprizita, kvankam oni kredis plej verŝajna, ke la ŝanĝo estos solene proklamita la 12an de decembro, kiam Kenjo festos sian dekunuan datrevenon de la sendependeco. Unu el la plej fervoraj kampanjantoj por la svahila estis jam dum pluraj jaroj la kenja ministro pri informado, Robert Matano, kiu eĉ minacis per maldungo de ĉiuj oficistoj de la ministerio, kiuj ne kapablas skribi kaj paroli la svahilan.

En sia dekreto (anoncita en la svahila), la prezidanto Kenjata diris ankaŭ la jenon: “Mi scias, ke pluraj komencos flustri, ke la tempo ankoraŭ ne estas matura por ĉi tiu decido. Al infero kun tiaj homoj! Tiuj, kiuj sentas, ke ili ne povas vivi sen la angla, povas bele paki siajn aĵojn kaj foriri.” Ke la opozicio al la definitiva abolo de la angla ne estas sensignifa, pruviĝis jam dum la sekvanta sesio de la nacia parlamento, kiam la prezidanto de la asembleo diris, ke la enkonduko de la svahila bezonos “iom da tempo”. Li tiurilate atentigis, ke necesos ankaŭ amendi la konstitucion, kiu precizigas, ke la angla estas la lingvo uzata en la parlamento. Sed, la prezidanto Kenjata reagis al tio per tuja direktivo, ke la uzo de la svahila en la parlamento komenciĝu senprokraste, je kio la parlamento reeĥis per akcepto de konstitucia amendo, laŭ kiu la svahila fariĝis la sola lingvo de la nacia parlamento.

La svahila ne estas la gepatra lingvo de ĉiuj kenjanoj, sed ĝi prave pretendas esti la lingvo de la unueco de Kenjo, ĝia plej grava koheriga elemento. Kvankam denaske parolata nur de ĉ. 70 000 kenjanoj, la svahila estas komprenata de minimume 60 procentoj de la landa loĝantaro, kiu en unu el la lastaj opinisondoj montris, ke 73 procentoj favoras la anstataŭigon de la angla per la svahila; la sama enketo evidentigis, ke nur

8 procentoj de la loĝantaro subtenas la ideon, ke la angla plue ĉefrolu.

Diference de la najbara Tanzanio, kie ne nur la nacia registaro klopodis promociigi la svahilan al la rolo de la nacia lingvo, sed tion grave subtenis ankaŭ la germanaj koloniistoj siatempe, la brita kolonia administracio malkuraĝigadis la uzon de la svahila en Kenjo. Krome, la britoj eĉ subtenis la lernadon de la indiĝenaj idiomoj, kio estis maniero teni la etnajn grupojn de Kenjo aparte kaj subfosi la unuigajn kaj sendependigajn tendencojn. Laŭ la t.n. "Raporto de Beecher", el la jaro 1947, en Kenjo ne eblis trovi komunan nacian lingvon kaj la svahila estis forigita el la instru-planoj de la elementaj lernejoj. Ĉio ĉi estis farita malgraŭ la fakto, ke la svahila jam en la jaro 1850 funkciis kiel komuna lingvo de la orienta Afriko. Pro tia brita sinteno, plia sekvo de la menciita raporto

kaj ĝia apliko estas la manko de kompetentaj instruistoj por la svahila.

Necesas tamen atentigi, ke la nuna registaro de Kenjo ne intencas neglekti la aliajn lingvojn de la landa loĝantaro; ili restas en la instruprogramoj de la elementaj lernejoj, samkiel en la programoj de la radio kaj televido.

La adopto de la svahila kiel la nacia lingvo de Kenjo alportos ne nur ŝanĝojn en la politika kaj socia vivo de la lando, sed kontribuos ankaŭ al pli efika kaj pli granda kunlaboro inter la landoj de la orienta kaj centra regionoj de Afriko, en kiuj la svahila nun estas parolata de ĉ. dek unu milionoj da homoj. Aliflanke, la definitiva abolo de la angla en Kenjo povas esti surprizo nur por tiuj, kiuj defendas kulturajn kaj politikajn konceptojn jam delonge anakronismajn.

RAPORTO DE LA LERNEJA ADMINISTRACIO DE FINNLANDO AL LA EDUKA MINISTERIO DE FINNLANDO:

La realeco de aliaj

Kun iom da malfruo atingis nin la traduko de la raporto, kiun ni aperigas ĉi-sube. La tuto ligiĝas al la artikolo "Propono al la Ministerio", kiun vi trovas en la marta numero de nia revuo (p. 43). Ni ja povis nur resumi la raporton de la supera lerneja instanco de Finnlando, sed ni decidiĝis aperigi la tutan tekston. Estas interese konatiĝi ankaŭ kun starpunktoj de ekstermovadaj instancoj, kiuj ofte ne estas ŝargitaj per la entuziasmo, tiel kutima en la Movado, sed, aliflanke, emas rigardi la aferojn pli realece, ol ni en la Movado tion faras.

PRO LA PROPONO¹ de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI), koncernanta la instruadon de Esperanto en la lernejoj de nia lando, la Lerneja Administracio estime deklaras jenon:

Dum tiuj preskaŭ 9 jardekoj, de kiam oni interesiĝas pri Esperanto, ĝi evoluis al esprimkapabla kaj multflanka komunikilo. Kiel el la aldonadoj de la propono de ELFI evidentiĝas, oni tradukis en ĉi tiun lingvon kaj ankaŭ originale verkis en ĝi kaj beletran kaj sciencan literaturon. La esperantistoj de la tuta mondo havas multajn internaciajn kontaktojn inter si, kaj la lingvo funkcias bone, tiel en la ĉiutaga vivo kiel sur la tereno de la oficiala lingvouzo.

En la geknaba lernejo de Somero, en la jaroj 1958-1963 efektivigita eksperimento montris, ke oni povas instrui Esperanton pli rapide ol la t.n. naciajn lingvojn, kaj ke la lernado de Esperanto do estas pli facila ol tiu de la aliaj lingvoj. La rezultoj de la eksperimento de Somero aludas ankaŭ al tio, ke la lernado de Esperanto eble helpas la lernanton pli facile proprigi al si aliajn lingvojn. Tamen oni ne akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj grandaj internaciaj organizaĵoj. Ĝi ankaŭ

kredeble apartenas al la oficiala lerneja lingvoprogramo de neniuj ŝtato.

Laŭ la esploro de la Komisiono por la plivastigo de la lingvosocio², en Finnlando oni instruas Esperanton en la Universitato de Helsinkio³ kaj ĉe la libera popolklerigado. La nombro de la studentoj estis en la lernojaro 1970-1971 ĉ. 900 personoj. En la lernejoj oni nuntempe ne instruas Esperanton. Ĉe la supera grado de la baza lernejo en Kuhmo komenciĝos la lernado kiel speciala kurso en la lernojaro 1974-1975⁴.

Por ke Esperanto helpu la lernadon de la aliaj lingvoj, ĝi devus havi la pozicion de la unua fremda lingvo, t.n. bufrolingvo. En Somero oni instruis Esperanton ĉe la 1-a-3a klasoj de la duagrada lernejo⁵ kaj, krome, en lingvoklubo. Jam ĉe la dua klaso oni komencis, apud Esperanto, la lernadon de alia fremda lingvo, kiu havis normalan nombron da studhoroj. La bezonatajn ekstrajn studhorojn oni prenis de la gepatra lingvo. Ĉe la supera grado de la baza lernejo simila aranĝo ne eblas, ĉar la nombro de la studhoroj en la semajno estas konsiderinde pli malgranda, ol estis en la duagrada lernejo dum la eksperimento de Somero (ĉe la 3-a kaj 4-a klasoj de la baza lernejo en 5 tagoj po



Helsinki, la ĉefurbo de Finnlando: Oni sentas la pezon de la lingva problemo kaj cedas.

2 studhoroj, ĉe la 1-a – 3a klasoj de la duagrada lernejo en la jaro 1963 en 6 tagoj po 5 studhoroj). Se la instruado en la lingvokluboj ne estos aranĝebla, la lingvoscio de Esperanto rustiĝos pro la manko de uzo. Aliflanke, Esperanto apenaŭ trovos lokon en la lernejaj planoj de la komunumoj, se ĝi estus, same kiel la franca, la germana kaj la rusa lingvoj, elektebla kiel la unua fremda lingvo, anstataŭ la angla aŭ la dua hejmlanda lingvo⁶.

Se Esperanto havus la pozicion de la unua fremda lingvo, la kvalifikado de la instruistoj de Esperanto devus okazi en la universitatoj same kiel tiu por la aliaj lingvoj. Tio kondiĉigus la enkondukon de Esperanto ankaŭ kiel ekzamena studfako de la universitatoj. Plej bone Esperanto konvenas al la lingvoprogramo de la baza lernejo kiel unu alternativo por la pozicio de la tria elektebla lingvo. Kiam oni jam iomete scipovas aliajn lingvojn, oni lernas Esperanton ankoraŭ pli facile. La enkonduko de Esperanto kiel tria elektebla lingvo antaŭsupozas respektivan ŝanĝon de la dekreto pri la baza lernejo, koncerne la 2an alineon de ĝia 20a paragrafo. Daŭriga instruado en la liceo ne estas bezonata, dum Esperanto ne havas la oficialan mondlingvan pozicion. La raporto de la Komisiono por la plivastigo de la lingvoscio esprimas la deziron, ke Esperanto estu instruata en la lingvokluboj de la liceoj.

Surbaze de la antaŭaj klarigoj la Lerneja Administracio prezentas kiel sian starpunkton la jenon:

1. La eksperimenta instruado de Esperanto montris, ke oni povas instrui la lingvon al la finnaj gelernantoj kun bonaj rezultoj. Plia eksperimento ne plu estas bezonata.

2. Estas bone sekvi la rezultojn de la eksterlandaj eksperimentoj kaj precipe la reagojn de la Unuiĝintaj Nacioj al la pozicio de Esperanto.

3. Al la lingvoprogramo de la baza lernejo Esperanto konvenas en la pozicio de la tria elektebla fremda lingvo. Kaj en la baza lernejo kaj en la liceo Esperanto devas havi la rajton esti instruata en specialaj kursoj kaj / aŭ en lingvokluboj.

4. La instruado de Esperanto kiel la unua fremda lingvo estos konsiderinda nur, se Unuiĝintaj Nacioj kaj la aliaj tutmondaj organizaĵoj akceptos ĝin kiel sian oficialan lingvon.

La 17an de julio 1974 Erkki Aho, ĉefdirektoro
Hanna Jaakkola, ĉefinspektorino

(Same opinias (1974-07-19) inspektoro Olli Sampola).

Piednotoj de la tradukinto, s-ino T. Tyynelä:

- 1 Propono de la 23a de januaro 1974.
- 2 Temas pri esploro farita en la jaro 1972.
- 3 Nuntempe oni ne instruas Esperanton en la Universitato de Helsinki, sed en la Universitato de Turku.
- 4 La instruado en Kuhmo komenciĝos en la lernojaro 1975-76.
- 5 En la 5a, 6a kaj 7a lernojaroj.
- 6 La sveda lingvo.

S. Szathmári 1897–1974

EN BUDAPEŬTO, la 27an de septembro 1974, forpasis Sándor Szathmári, unu el la plej grandaj figuroj sur la beletra kampo de la Internacia Lingvo. La funebran solenaĵon ĉeestis kaj dum ĝi parolis ankaŭ la prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, d-ro József Mátéffy.

Sándor Szathmári naskiĝis la 19an de junio 1897. Profesie li estis maŝiningeniero, plenuminta sian fakan karieron ĉe la konata maŝinuzino Mávag, en la hungara pezindustria ministerio kaj en projekta buroo. Szathmári lernis la Internacian Lingvon jam en la jaro 1912, sed la internacia Movado familiariĝis kun lia nomo nur en 1958, post la apero de lia romano *Vojaĝo al Kazohinio*. Tamen, laŭ lia propra aserto, lia unua artikolo en Esperanto aperis en 1934, en *Sennaciulo*. Inter la jaroj 1937 kaj 1942, Szathmári estis afergvida prezidanto de Hungara Esperanto-Societo. Krom la romano *Vojaĝo al Kazohinio*, kiu estis verkita en 1938 kaj antaŭ la apero de sia Esperanta originalo trifoje traduke eldoniĝis en la hungara, libroforme de Szathmári aperis ankaŭ la novelaro *Maŝinmondo* (J. Régulo, 1964), hungarlingva traduko de *Kredu min, Sinjorino!* de C. Rossetti (1957) kaj la Esperanta traduko de la



hungara infanlibro *Ĉu ankaŭ vi scias?*. Szathmári estas reprezentita en la antologia novelaro *33 Rakontoj* (J. Régulo, 1964) per unu novelo. Pliaj noveloj de Szathmári aperis en *Norda Prismo*, la *nica literatura revuo*, *Belarto*, *Monda Kulturo* kaj *Hungara Vivo*. Per artikoloj pri movadaj kaj beletraj temoj li kontribuis i.a. al *Sennacieca Revuo*, *La Praktiko*, *Sennaciulo*, *Hungara Vivo*, *Monda Kulturo* kaj tiu ĉi revuo.

Szathmári ne verkis abunde, sed li, malgraŭ siaj stilaj mankoj (kiujn pluraj elstarigas), sukcesis trudiĝi kiel unu el la plej seriozaj kontribuintoj al la Esperanta prozo, eble la sola proza verkisto en la Internacia Lingvo kun krea formato atentinda ankaŭ ekster la Movado. Traktantaj regule iun imagitan, ne plu tiel foran, estontecon de la homaro, la verkoj de Szathmári satire vipas la homan socion, farante tion sen ideologiaj rezervoj kaj sen ajnaj percepteblaj tempaj aŭ lokaj precizigoj. Kalocsay diras pri *Vojaĝo al Kazohinio*, – “la libro estas insida”; Auld metas la verkon de Szathmári samnivele kun Swift, Wells, Anatole France; Duc Goninaz trovas, ke la legado de Szathmári estas “potenca instigo al pensado”; Benczik precizigas la klasifon de la verko de Szathmári per la esprimo “sobriga humanismo”.

Richard Henry Geoghegan

RICHARD H. GEOGHEGAN, irlanddevena anglo, poste usonano, rimarkinda filologo kaj ŝajne la unua angleparolanta esperantisto, naskiĝis la 8an de januaro 1866 en Birkenhead, Cheshire, Anglujo. En sia tria vivojaro li suferis ŝtuparan akcidenton en la hejmo, rezulte de kio li restis kripla la tutan vivon, marŝante pene, ofte kun helpo de lambastonoj. Kvazaŭ kompanse por sia fizika lameco, li de sia junaĝo montris eksterordinarajn intelektajn povojn, precipe en la lernado de lingvoj. Estante ĉ. 17-jara, li interesiĝis pri orientaj skribsistemoj kaj eniris la Universitaton de Oksfordo, en januaro 1884, por studi la ĉinan lingvon. Li tie montriĝis elstara lernanto, ricevante dufoje premiajn stipendiojn, sed ne diplomiĝis. En Oksfordo

la ĉina lingvo restis ĝis 1936 nediplomiga studobjekto. Jam en la aŭtuno de 1887, Geoghegan legis artikolon pri la ĵus aperinta lingvo Esperanto, kaj tuj kontaktis letere (en latina lingvo) kun Zamenhof, kiu sendis al li germanan eldonon de sia t.n. *Unua Libro*. Ellerninte la lingvon el ĝi, tuj, Geoghegan iom poste ricevis de Zamenhof la unuajn ekzemplerojn de la sama libro en anglalingva traduko de varsovia hebreo J. St. (pseudonimo de Julian Steinhaus). Geoghegan devis atentigi Zamenhof, ke la traduko estas fuŝaĵo, kiu nur ridindigus la aferon inter angleparolantoj. Sekve de tio, Zamenhof petis al Geoghegan mem fari pli taŭgan tradukon, kion li fakte faris. La traduko de Steinhaus estis retirita, kaj en 1889 publikigita tiu de Geoghegan.

En la Unua Adresaro Geoghegan havis la numeron 264. Richard Geoghegan forlasis Oksfordon fine de 1887 kaj estis instruisto de klasikaj lingvoj en Londono ĝis 1891, kiam li kun siaj vidva patrino kaj gefratoj migris al la vilaĝo Eastsound en la nordokcidenta angulo de Usono. Ne trovante en la tiea fiŝista - farmista medio oportunon por vivteni sin, li en 1893 iris al Tacoma, en la ŝtato Washington, kie li laboris kiel stenografiisto por anglikana episkopo, poste ankaŭ por la angla kaj japana konsuloj. Li fondis, kune kun du-tri aliaj lingvistoj, la Filologian Societon de la Ŝtato Washington, kaj mem kontribuis al ĝi plurajn valorajn disertaĵojn pri la interrilatoj de antikvaj orientaj kaj amerikaj skribsistemoj kaj pri kalendaraj sistemoj.

Dume li sensukcese klopodadis ricevi postenon kiel profesoro pri ĉina lingvo en la Universitato de Washington en Seattle, kaj en la unuaj tagoj de 1903 akceptis inviton de la fama juĝisto James Wickersham veni al Alasko kiel tribunala stenografiisto. En 1905 li elektigis kiel la unua prezidanto de la nove fondita Amerika Esperanto-Asocio, sed fakte ne povis prezidi pro sia foresto.

Spite la rigoran klimaton kaj krudan orminejan medion, plaĉis al Geoghegan la neformala alaska vivmaniero kaj la oportuno de proksime studi la aleŭtan kaj aliajn indiĝenajn lingvojn de la regiono. Krom la jaroj 1905, kiun li pasigis en Seattle (kie fondiĝis la Societo Esperantista de Seattle precipe pro lia influo kaj tiu de lia amiko, William G. Adams) kaj 1914, kiam li vojaĝis tra okcidenta Usono kaj Japanujo,



Richard Henry Geoghegan (1866-1943)

Geoghegan restis loĝanto de Alasko ĝis sia morto la 27an de oktobro 1943.

Pro siaj lameco kaj fizikaj malfortoj, Geoghegan havis retireman naturon kaj ĝis 1916 ne edziĝis. En tiu jaro, enamiĝinte al Ella Joseph-de-Sacrist, li edziĝis al ŝi nur sekrete, laŭ la konsilo de amikoj, pro la ekzistantaj rasaj antaŭjuĝoj: Ella, kiu venis el Martinique, estis okone negra. Ŝi mortis en 1936. (Tio klarigas, ke en iuj biografiaĵoj oni legas, ke li neniam edziĝis.)

Geoghegan vivis simple, plej ofte en krudaj trunkaj kabanoj, ĉe diversaj adresoj en la urbo Fairbanks. Multaj enloĝantoj eĉ ne sciis, ke la modesta najbaro fakte estas renoma filologo, kiu scipovas dekon da lingvoj, konsultiĝas koresponde kun la plej famaj lingvistoj de la mondo, kaj kontribuadas al fakgazetoj pri lingvaj temoj.

Li ĉiam restis fidela al Esperanto, al kies Lingva Komitato li elektigis en 1905. Ĝi tamen estis por li ĉefe skriba lingvo. La unua, kun kiu li parolis ĝin, estis W.H. Trompeter, kiu foje vizitis lin en Eastsound. Lia valora biblioteko, inkluzive de multaj originalaj leteroj de Zamenhof kaj aliaj pioniroj, kiel ankaŭ de raraĵoj pri nekonataj — ĉefe orientaj — lingvoj, pereis kiam la familia hejmo en Eastsound forbrulis en 1906. Probable, la plej elstara lingvistika kontribuo de Geoghegan estis la kompilo de vortaro kaj gramatiko pri la aleŭta lingvo de la alaskaj insuloj, super kiu li laboradis ekde sia alveno en Valdez, Alasko, en 1903. Ĝi fine aperis presita nur post lia morto, en 1944, kaj restas ankaŭ hodiaŭ la ĉefa anglalingva verko pri la temo.

Verkoj de Richard H. Geoghegan: *Dr. Esperanto's International Language, Introduction & Complete Grammar* (Warsaw, 1889); *The Universal Language "Esperanto". Complete Instruction Book with two Vocabularies*, translated after the Russian of Dr. L. Samenhof (Nurnberg, 1892); dua eldono de la sama (Upsala, 1898); *Grammar and Exercises of the International Language Esperanto*. Adopted from the French of L. de Beaufront (London, 1904); *A Few Words on the International Language "Esperanto"*, Zamenhof, translated by R.H. Geoghegan (Upsala, 1898); *The Aleut Language* (Washington, D.C., 1944). Geoghegan ankaŭ kompilis la fremdlingvajn sekciojn (ĉefe rusan) de: Wickersham, James, *A Bibliography of Alaskan Literature, 1724-1924* (Fairbanks, Alaska, 1927).

La leteroj, taglibroj, kaj aliaj paperoj de Richard Geoghegan troviĝas en Richard Geoghegan Collection, Rasmuson Library, University of Alaska, Fairbanks.

David Richardson
Rt. 1 Box 81
Eastsound, WA 98245
Usono

Rimarko: David Richardson, laŭ iniciato de la Universitato de Alasko, dum multaj jaroj kolektadas la paperojn de kaj biografiajn detalojn pri Richard Geoghegan. Surbaze de tiaj informoj li nun pretigas libron pri Geoghegan, anglalingve, kun la titolo *Shamrock in Alaska*.

Supren penetris frost'

Glacia vent' trablovis vangojn tranĉe,
kirlante mortfoliojn sur la strat',
taksioj preterkuris konsonance,
bruegis kamionoj sen kompat'.
Venis neniŭ bus' ĉe l' haltejfoŝt'.
Penetris supren de du plandoj frost'.
Nudpintaj platanbranĉoj staris treme,
enpikis en ĉielon de bluet',
postsunsubiraj nuboj brunis splene,
transfluis jet' en ŝarka siluet',
dronis tenebren jam ruĝkest' de poŝt'.
Penetris supren tra genuoj frost'.
Provoke ĉe l' amaso bus-embuska
taksion stopis junoficistin'.
Reflekse povris mia viv' krepuska,
momente ridis sarkasma destin'.
Daŭris pentebloj jaroj jam depost
milit'. En kor' trafulmis mensa frost'.
Juntage mi ja laboradis sklave,
timante senlaboron pro panik'.
Junulojn nun dorlotas tiel grave
kiel la oran ovon sen kritik'.
Ĉu laŭ destin' ĉenite de l' karma vost'
mi devis, devos vivi plu en frost'?!
Jam nokt' vualis, frida vent' inferis,
rektsupre jet' tondriris, fi-gangren',
blindigis reflektoroj; ne aperis
aĥ buso, . . . ĉu tro stagnis pro homplen'?
Spite de rezignaciem' ĝis ost'
jam pelis min ekpaŝi korpa frost'.
Laŭlonge de senĉesa aŭta fluo
sur trotuar' kuretis kontraŭ vent'
por gajni varmon kun dilema skuo,
ĉu buso preterkuros en moment'.
Vivo verŝajnas veto kun ripost'!
Nur fuĝo prompta for de l' nuna frost'.

Reutao

Surstrate pikis
min vespervent' frosttrema,
elteno vekis
defian forton eĉ en mi
denaske rezignema.

La adoleska
aspiro jam senspuris,
en viv' krepuska
ankoraŭ mi vegetas,
destina frost' min torturis.

Kuroda masayuki, Japanio

Kiu luktas, tiu vivas

Recenzas Petar Stefanović (Jugoslavio):

Nuda inter lupoj, de Bruno Apitz. Trad. K. Schulze.
Edition Leipzig, 1974. 480p. 20cm. Bindita.

Multaj libroj estis publikigitaj pri la mondo de la naziaj koncentrejoj. Ĉiu el ili, diversmotive, havas sian valoron kiel atesto pri homaj digno kaj fiero. Sed la verko de B. Apitz, tradukita en dekojn da lingvoj kaj presita en milionoj da ekzempleroj, estas multe pli ol simpla rakonto pri la nekredeblaj travivaĵoj kaj la konsciigo de grupo da homoj, kiujn la milito hazarde kunigis en la naŭa cirklo de la infero de Buchenwald.


En formo de romano la aŭtoro elvokas la dek lastajn tagojn en la koncentrejo, prilumante la agadon de la sekreta Internacia Barakara Komitato, de kies saĝeco kaj decidemo dependos la fina venko aŭ malvenko de la depost monatoj preparata ribelo. Kiam la barakaro insurekcios? Kiam la internigitoj ekprenos la armilojn? Malpacienco aŭ hezitemo povus okazigi la ĝeneralan amasbuĉadon fare de la SS-anoj aŭ la pereon de miloj da homoj dum la evakuado. Sed la ĉefa intrigo disvolviĝas ĉirkaŭ alia temo, ankaŭ ĝi bazita sur verkonforma fakto. La leganto pasiĝas pri la sorto de la trijara infano, kiun, kaŝitan en sia mankofero, pola deportito kondukis en la barakaron. Kio fariĝos pri tiu infano, kies ĉeesto morte endanĝerigas la tro multnombrajn konspirantojn, kiuj ĝin protektas? Ĉu la internigitoj savos ĝin de la morto, ne kompromitante la tutan sekretan organizaĵon kaj la vivon de 50 000 homoj?

Sed la kvalitoj de la romano ne limiĝas al la streĉa atendado, kvankam la aŭtoro ne tro okupiĝas pri la serĉado de novaj literaturaj formoj. Ekkoninte plurajn malliberejojn kaj travivinte ok jarojn en Buchenwald, B. Apitz metas en lumon la transformigon kaj konsciigon de la individuoj en la akra interna batalo, kiun unuigis kaj orientis al la supervivo la Internacia Barakara Komitato. Tra la tuta romano la leganto vivas kun la deportitoj kaj partoprenas en iliaj espero kaj soifo al liberigo, admirante, super la turmentigo, singardemo kaj ruzo, ilian konsentitan disciplinon, neaŭditajn sinoferojn kaj heroismon.

Temas pri libro de la fido al la homo.

La traduko estas facile legebla. Preseraroj estas tre maloftaj kaj negravaj. Ĉe la fino de la libro estas aldonitaj Glosaro kaj Prononco proksimuma de propraj nomoj.

Mendu ĉe UEA: 12,— (por Nederlando 12,48) gld. plus sendokostoj 10%.



Ekslibrisoj de M. Bakalov por: V. Setälä kaj W. Auld (supre); I. Schleicher, J.E. Bachrich kaj J. Pool (meze); S. Khan, E. Lapenna kaj Baldur Ragnarsson (sube).

Ekslibrisoj

KUTIME ilustraĵo(j) akompanas tekston, sed ĉi tie estas inverse: la teksto klopodas iom klarigi la apudajn ilustraĵojn. La konatiĝon kun la ekslibrisoj de la bulgara pentristo Mitko Bakalov ni ŝuldas al s-ro Metodi Panĉev, unu el tiuj malmultaj elituloj, kiuj sukcesis ĉe la Internacia Ekzameno.

Mitko Bakalov (40-jara) diplomiĝis ĉe la Supera Instituto de Pentroarto en Sofio. Komence de 1971, Bakalov aranĝis sian unuan ekspozicion de ekslibrisoj en la urbo Sliven, kie li nun vivas kaj laboras. Meze de la sama jaro, li aranĝis similan memstaran ekspozicion en Sofio, kie li konatiĝis kun s-ro Panĉev kaj tiamaniere ankaŭ kun Esperanto. La artisto rapide entuziasmiĝis pri la Internacia Lingvo, eklernis ĝin kaj decidis produkti kelkajn ekslibrisojn ankaŭ por konataj nomoj de la Movado. Tiel naskiĝis plurdeko da ekslibrisoj por konataj esperantistoj. Oni faris provojn ekspozicii la movadajn ekslibrisojn dum la UK en Beogrado, sed tio pro teknikaj kialoj ne realiĝis. Oni tamen ankoraŭ ne rezignis pri simila aranĝo foje.

Necesas atentigi, ke la ekslibrisoj, kiujn vi vidas ĉi tie, estas elekto, kiun diktis la reprodukto-eblecoj, ĉar la aŭtoro liveris al ni plurajn desegnaĵojn sur ruĝa papero, kio montriĝis nekonvena por fotografi.

Por vasta publiko

Recenzas Lajos Lesznai (Hungario):

Floroj sen kompar', de M. Hill kaj W. Auld. Londono: BEA, 1973. 87p. 21cm. Mimeo.

Kantanta mia bird', de M. Hill kaj W. Auld. Londono: BEA, 1973. 95p. 21cm. Broŝ.

Roseroj, melodioj kaj tekstoj, de R. van Dalsem. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag. 1974. 47p. 21cm.

Antaŭ mi estas tri volumetoj, enhavantaj kantojn — muziknotojn kaj tekstojn. Granda estas la diferenco inter ili: la du unue menciitaj volumetoj enhavas britajn popolkantojn, la tria esperantlingvajn poemojn kaj al ili verkitan muzikon. Se ni volas taksi la valoron de ĉi tiuj verkoj, ni devas apogi nin sur la principo, ke la estetikaj-artaj leĝoj de la popolmuziko fundamente diferencas de la estetika aspekto de l'artaj komponaĵoj. Unue ni diru kelkajn vortojn pri la popolkantoj: Ne konante la originalajn tekstojn, mi ne povas prijuĝi la tradukojn, sole konstati, ke la versoj de la esperantigitaj britaj popolkantoj ŝajnas esti perfektaj. Por esperantistoj certe estas agrable kanti ilin.

Pri la melodioj superfluas aparte paroli. Al mi plaĉas precipe la kantoj, kiuj havas speciale nacian karakteron.

La antaŭparolo de la popolkanta kolekto mencias, ke "ĉi tiujn kantojn oni origine kantis sen akompano". Mia konvinko estas, ke sen muzikinstrumenta aldono la popolmelodioj sonas certe plej bele, antaŭ ĉio la melodioj, kiuj staras en gamoj iom fremdaj por la okcidenteŭropa muzikkulturo.

Per ĉi tiuj popolkantoj estus eble ornamu esperantlingvajn programojn. Kompreneble ne estas indiferente, kiuj popolkantoj eksonas dum la programo, tio dependas de la aliaj programeroj. Mi rekomendus, ke la elekton faru nepre brita eksperto por eble montri al eksterlandanoj la belecon de la brita popolmuziko. Pri la kantoj de Ramona van Dalsem estas eble same diri, ke ili farus bonan efikon dum Esperanto-programeroj. Estas vero, ke la karaktero de iliaj melodioj havas malpli nacian karakteron, ol la popolkantoj; tamen estas certe, ke ili plaĉus al la vasta publiko. Precipe la tekstoj pruvas la belsonecon de la Internacia Lingvo kaj la talenton de la aŭtoro.

La tri kajeroj estas bonaj pruviloj, ke en Esperanto oni jam konstruas muzikkulturon, eldonante komponaĵojn kiuj pliriĉigas ne nur la muzikkulturon, sed samtempe fortigas la kulturon de Esperanto ĝenerale.

Mendu ĉe UEA: respektive 3,90; 3,90; 4,80 (por Nederlando 4,06; 4,06; 4,99) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Antaŭ kaj post ŝtormo (1974) 35p. Kolorilus. 21cm. Broŝ. 1,20 gld. Ĉina bildrakonto.

Else kaj Bo R. Christophersen. El la dana trad. G. Riisberg (1974). 40p. Ilus. 20 cm. Broŝ. 2,40 gld. Du simplaj rakontoj por junaj infanoj.

Enkonduko en la organikan kaj biologian kemion (1974) S. Kawamura. 89p. 29cm. Broŝ. 18,— gld. Kursoteksto de la Someraj Universitataj Kursoj 1974.

Glumarko "Amikeco trans limoj" (1974) Folio kun 12 memgluaj markoj, ĉiu 35 x 41 mm. 0,60 gld. La emblemo de la Semajno de Internacia Amikeco verde presita sur flava fono.

Granda galerio Zamenhofa (1973) A. Holzhaus. 527p. Ilus. 30cm. Bind. 66,30 gld. Kolekto de 952 fotoj rilataj al L.L. Zamenhof kaj liaj familianoj.

Interesa Arkeologio (1974) M. Gjivoje (1919 —). 60p. Ilus. 17cm. Broŝ. 6,— gld. Dek popularsciencaj skizoj pri arkeologiaj temoj.

Kruko kaj Baniko el Bervalo (1970, dua preso 1974) L. Beaucaire. 143p. Ilus. 21cm. Broŝ. 16,— gld. Korektita represo de maldeca anekdotaro, kies unua preso elĉerpiĝis en malpli ol unu jaro.

Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko (1974) M. Duc Goninaz. 38p. 29cm. Broŝ. 9,30 gld. Kursoteksto de la Someraj Universitataj Kursoj 1974.

Literatura Mondo, vol. 1 (1922-1923) 368p. 31cm. Bind. Por ĉiuj ses volumoj 300,— gld. Unua volumo de la kompleta represo de altnivela kaj influa periodaĵo.

Malbona lupo (1974) El la portugala trad. A. Afonso Costa. 20p. Ilus. 22cm. Broŝ. 1,80 gld. Abunde kolorilustrita infanrakonto kun spiritisma inklino, amuze verkita surbaze de la fama fabelo pri la Ruĝĉapulino.

Manlibro de varbado (1974) G. Conrad. 79p. 21cm. Broŝ. 6,— gld. Konsiloj pri varbometodoj, kun aparta atento al psikologiaj faktoroj kaj al reklama grafiko.

Mia verda breviero (1974) J. Forge (1903 —). 263p. 18cm. Broŝ. 13,50 gld. Humura novelaro primovada.

Ni devas vivi (1974) K. Walraamoen, L. Gabrielli. 154p. 19cm. Broŝ. 8,70 gld. En unu volumo du debutaj poemaroj, de la norvego K. Walraamoen kaj la italino Lina Gabrielli.

Ni laboru kaj esperu! (1974) L.L. Zamenhof. 342p. 21cm. Bind. 19,80 gld. Leteroj, dokumentoj, artikoloj kaj poemoj de Zamenhof el la jaroj 1887-1891, kun postparolo, notoj, indekso kaj kronologio.

Nova teatro (1974) E. Lapenna. 55p. 17cm. Broŝ. 2,40 gld. Naŭ monologoj originalaj.

Porfirinoj (1974) M. Flint. Nenumerita. Broŝ. 29 cm. 16,20 gld. Kursoteksto de la Someraj Universitataj Kursoj 1974.

Senmorta kaj la senviva, La (1974) N. Isaac. 44p. 21cm. Broŝ. 6,— gld. Pri la spiritismaj spertoj de la aŭtoro.

Sur la vojo al la lumo F.C. Xavier. El la portugala trad. A.K. Afonso Costa (1974). 174p. 18cm. Broŝ. 5,40 gld. Historio de la civilizo, laŭ spiritisma vidpunkto.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

MATEMATIKO PER ESPERANTO:

Ili nepre komprenos vin

La vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, Atanas D. Atanasov, sendis al ni antaŭ pluraj monatoj ĉi tiun artikolon. Temas pri lia traduko de fragmento el la bulgarlingva verko "Pri la matematiko kaj la matematikistoj", kies aŭtoro, prof. d-ro Blagovest Dolapĉiev, elstara matematikisto, regis la Internacian Lingvon, sed ŝajne neniam multe aktivis pri ĝi. Li forpasis antaŭ kelka tempo.


Ni volas emfazi, ke la apero de ĉi tiu teksto en nia revuo ne ŝuldiĝas nur al ĝia interesececo, sed ankaŭ al ĝiaj instigaj kvalitoj.

POST LA RIMARKINDA PUBLIKAĴO en Esperanto sub la titolo "La paraanalitikaj funkcioj de n dimensioj" de la eminenta franca matematikisto Maurice Fréchet (Moris Freŝe), membro de la Franca Akademio, aperinta en 1956 en la renoma matematika revuo *Zeitschrift für reine und angewandte Mathematik*, kiu aperadis nur en okcidenteŭropaj lingvoj — la franca, la germana, la angla kaj la itala —, tamen ĝi faris escepton pro la granda sciencisto, konvinkita adepto de la Internacia Lingvo, per publikigo de lia artikolo en Esperanto, similan "aŭdacon" ripetis la juna bulgara matematikisto-algebristo Tonko Tonkov. Pri tiu ĉi aŭdacaĵo tamen la kulpo estas mia, ĉar tio okazis ne pro lia, sed pro mia iniciativo. Mi agis tiel ne pro hazarda ekideo, nek por fari ŝercon. Malgraŭ

ke la "grava" problemo "en kiu lingvo fari la raportojn en internaciaj sciencaj konferencoj" estis kaŭzo por pli ol unu malfeliĉa incidento — mi, estante konvinkita partiano de racie farita internacia lingvo (ne nepre Esperanto), enmiksitis min, por pruvi, ke neniuj perdis, se oni raportus en tia lingvo — kontraŭe, ĉiu povus kompreni pro ĝia simpla gramatika konstruo kaj komune konata internacia leksika fonduso. Ĉi-foje ne temis pri publikigo de verko, sed pri matematika raporto, farita de Tonkov en Esperanto.

Tio okazis en la 3a Balkanlanda Matematikista Kongreso en 1966 en Bukareŝto.

Mi sciis, ke mia juna kolego Tonko Tonkov estis esperantisto. Jam kiam li estis studento de matemati-



**Kuraĝo aŭ nur konscio pri la valoroj de Esperanto:
D-ro Aŝvinikumar, juna hinda matematikisto, kiu sian
doktoriĝan disertacion verkis en la Internacia Lingvo.**

ko, mi rimarkis, ke sur la reverso de sia jako li portis la esperantistan insignon — verda kvinpinta steleto. Unu tagon antaŭ la okazigo de lia raporto mi demandis lin:

- En kiu lingvo vi faros la raporton?
- En la rusa, — respondis Tonkov.
- Faru ĝin en Esperanto!

Tonkov ekridetis, pensis iom kaj rigardis min konfuze, videble kun malfido.

— Jes ja, faru la raporton en Esperanto. Estas vero, ke la rumanoj, el kiuj konsistos la plimulto de viaj aŭskultantoj, lastatempe lernas fervore la rusan lingvon, tamen ili preferus aŭdi raporton en la franca, kiu estas tre populara ĉe ili. Sed en Esperanto ili nepre komprenos vin, kiel same la ceteraj neslavaj aŭskultantoj — alilandanoj.

Tonkov plue meditis, silentis kaj rigardis min heziteme. Li estis konvinkita — pri tio mi ne dubis —, ke mi, lia iama instruisto, parolas serioze. Sed mia propono ŝajnis al li neserioza (pro kio ja?) kaj tial li hezitis doni respondon. Mi memorigis al li pri la artikolo de Maurice Fréchet en *Crettle Journal*. Ŝajne tio ĉi efikis kaj fine li decidis:

- Nu, eble mi provos.
- Kaj bone vi faros — mi daŭre kuraĝigis lin. — Verku vian raporton en Esperanto kaj, ne avertante la prezidanton aŭ la aŭskultantojn, tuj komencu elmeti vian temon.

Tonkov faris tiel. La temo estis algebra: “Pri unu nombra konsekvenco”. Li parolis ne tre laŭte, sed trankvile:

“Estu f unu funkcio de du argumentoj, kiu havas nur entjerajn valorojn, kaj estu k unu arbitra entjera nombro. De la konsekvenco $k, k + 2 \dots$ ni forigas ĉiujn nombrojn de la formo $f(k, 1), f(k), \dots$ Estu k_1 la unua neforigita nombro. De la konsekvenco $k_1, k_1 - 1, \dots$ ni forigas ĉiujn nombrojn de la formo $f(k_1, 1) f(k_2, 2) \dots$ ktp.

“Ni observas la konsekvencon $k, k_1 \dots$ Ĝi estas ricevita pere de ĝeneraligo de la kriblo de Eratosteno. Ĝiaj nombroj posedas ecojn, similajn al ecoj de la primnombroj. En tiu ĉi informo ni priskribas iujn de tiuj ecoj.”

Komence la aŭskultantoj povis eksenti nenion nekutiman, nenaturan, ĝis la raportanto enpaŝis la esencan parton. Li skribis kaj parolis, eksplikis per mallongaj frazoj en Esperanto la skribiton, singardeme elparolis la lemojn kaj la teoremojn, atentante akcenti ĉiam la antaŭlastan silabon de la vortoj, kiel postulas tiu ĉi planlingvo.

De tempo al tempo la aŭskultantoj turnis sin unu al alia, interrigardis sin, sed faris nenion pli, kuraĝante nek kontraŭagi, nek dividi sian miron, por ne ĝeni la raportanton, kiu daŭrigis sian eksponon per trankvila voĉo.

Kiam Tonkov remetis la kreton kaj ekrigardis la prezidanton, kio signifis, ke li jam finis sian raporton, tiu ĉi surprizita ne malpli ol la aŭskultintoj, anstataŭ rimarkigi ion pri la stranga lingvo, en kiu la raporto estis farita, turnis sin al ili per la kutimaj “plurlingvaj” demandoj:

— Qui prend la parole? ... Est-ce qu'il y a des questions? ... Who wishes to speak? ... Are there any questions? ... Wer will das Wort haben? ... Gibt es irgendwelche Fragen? Kto hoĉet slova? ... Jest voprosy? ... *

En la unua vico sidis, se mi memoras, Onicescu (Oniĉesku), profesoro ĉe la Bukareŝta Universitato, elstara teoriulo - fizikisto, mekanikisto kaj analitikisto. Li tuj levis la manon kaj petis la parolon:

— Mi kredas, ke ĉiuj ĉeestantoj komprenis pri kio temis en la raporto de tiu ĉi juna homo. Tamen nur unu aferon ni ne povis kompreni: en kiu lingvo estis la raporto? ! ...

La salono gaje vigliĝis. Onicescu daŭrigis:

— ... En la itala ĝi ne estis, nek en la hispana, nek en la portugala, des malpli en la rumana, kvankam ĝi similis la latinan ...


— En Esperanto —, diris duonridete, duonkulposente Tonkov.

— ? !

Ĉar ne aperis plu aliaj demandoj, sekvis aplaŭdoj. Sed ĉi-foje ili ne estis nur pro ĝentileco, ĉar ŝajne ili rilatis ne la raporton mem, sed la lingvon, en kiu ĝi estis farita!

Prof. d-ro Blagovest Dolapĉiev

* Kiu volas paroli? ... Ĉu estas demandoj? ...



60a Universala
Kongreso
de Esperanto
Kopenhago
26.7 - 2.8 '75



Kongresa Komunikilo

60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 — 08 02

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam
-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks
1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Oficiala flugkompanio: SAS

La flugkompanio SAS (Skandinavia Aerlinia Sistemo), kies ĉefsidejo troviĝas en Kopenhago, estas nomita kiel oficiala flugkompanio de la 60a UK. El detala interkonsento inter la Kongreso kaj SAS estas menciinde jam nun, ke SAS havigos belajn dokumentujojn por ĉiuj kongresanoj. LKK rekomendas al ĉiuj karavan-vidantoj, kiuj ankoraŭ ne kontraktis kun flugkompanio, turni sin unue al la reprezentanto de SAS en la koncerna lando.

Kontaktoj ĉe ministerio

Dum plurtaga vizito al Kopenhago en oktobro, la vicedirektoro de la Centra Oficejo, Simo Milojević, estis akceptita de ambasadoro R. Hansen en la dana ministerio por eksterlandaj aferoj, kune kun la vicprezidanto de LKK s-ro Ejnar Hansen. Estis pridiskutitaj la eblecoj de kunlaboro de la danaj instancoj por Dana Vesperto en la kongresa programo, kaj de eldono de nova filmo kaj informbroŝuro pri Danlando en la Internacia Lingvo.

Nova sekretario de la Belartaj Konkursoj

La Belartaj Konkursoj, kiujn rajtas partopreni ĉiu aliĝinto de la UK aŭ individua membro de UEA, havas novan sekretarion: s-ro Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey, SM5 3SE, Britio. La limdato por konkursaĵoj estas la 31a de marto 1975. Detala regularo de la Belartaj Konkursoj aperas en la broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA", senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

ISU: Ĉu vi prelegos?

La nombro de personoj kompetentaj prelegi en la Internacia Somera Universitato — ĉiujara parto de la programo de la Universala Kongreso — estas jam tiel granda, ke nur publika alvoko havas ŝancon atingi ĉiujn. Se vi deziras proponi vin kiel preleganton por la venonta sesio de ISU en Kopenhago, bonvolu turni vin rekte al la nova aganta sekretario de ISU: Prof. Jonathan Pool, Department of Psychology, McGill University, P.O. Box 6070, Station "A", Montréal,

Québec H3C 3G1, Kanado. Preleganto devas aŭ jam havi la rajton instrui en universitato de sia propra lando aŭ esti "rekonita fakulo"; se vi ne estas certa, ke vi plenumas tiun kondiĉon, simple donu la detalojn kun via propono. Proponoj devas atingi la sekretarion plej malfrue ĝis la fino de februaro 1975 — sed ju pli frue, des pli bone. Kvarmembra komisiono kompilos la programon por aprobo de la Estraro de UEA, kiu decidis ĉi-jare iom eksperimenti pri la formo de la ISU. Aparte bonvenaj estas proponoj pri ne nur unu prelego, sed pri kombino de prelego kun speciala seminario samtema. La proponon akompanu biografiaj notoj pri la proponinto kaj resumo de la prelego (kaj eventuala seminaria temo). La Kongreso pagas honorarion al ĉiu preleganto de ISU.

Alfluas garantioj

La Loka Kongresa Komitato raportas, ke jam alfluas promesoj pri la garantia kapitalo ne nur el Danlando sed ankaŭ el pluraj aliaj landoj. Ĝi estas tre kuraĝigita de la reagoj al la pli frue aperinta alvoko kaj deziras publike danki ĉiujn, kiuj skribis. Pliaj garantioj (t.e. promesoj kontribui monsumon en la okazo, se la Kongreso havus deficiton) estas kompreneble tre bonvenaj.

Anoncantoj rapidu!

Reklamado en la kongresaj eldonaĵoj — unuavice la Dua Oficiala Bulteno kaj la Kongresa Libro — estas tre efika maniero atingi elektitan publikon, nome ĝuste tiujn aktivulojn, de kiuj dependas la Esperantomovado, ĉu sur monda, landa aŭ loka niveloj. Jam grandpaŝe proksimiĝas la limdato por akcepto de anoncoj por la Dua Bulteno: la 31a de decembro 1974. Kiu konsideras aperigi pagitan anoncon en ĝi aŭ en la Kongresa Libro, povas peti detalan informilon kun tarifo, teknikaj detaloj kaj mendilo ĉe la konstanta adreso de la Kongreso. Jam pluraj el la plej favoraj anonco-spacoj estas rezervitaj, do ne prokrastu!

Denove favoraj kondiĉoj por tiuj kun "problemoj"

Kiel (unufoje) por la pasinta Universala Kongreso, ankaŭ por Kopenhago ekzistas specialaj kondiĉoj por personoj kun transpagaj aŭ pasportaj problemoj. Kiu ne povas anticipi transpago la kongreskotizon al Rotterdam aŭ al sia landa kongresa peranto, aŭ kiu ne povas esti ĝustatempe certa pri ricevo de pasporto, tiu rajtas sendi la aliĝilon sen la samtempa pago, al la konstanta adreso en Rotterdam, kune kun klariga letereto. Tiaj personoj ne estos jam rigardataj kiel aliĝintoj, sed ili havos la rajton aliĝi tuj post la alveno en Kopenhago, pagante tie la kotizon laŭ la tarifo de la unua periodo.

LA 18a INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ:

La vintra ISU

MULTAJ LANDAJ SEKCIOJ de TEJO organizas ĉiujare veran amason da seminarioj, tendaroj, semajnfinaĵoj, aranĝoj, renkontiĝoj, "kunloĝadoj", ekskursoj, kursoj intensaj kaj malrapidaj. Ĉiu el tiuj aranĝoj estas pli aŭ malpli sukcesa, sed la Esperanta gazetaro pro la kutima dolĉvortemo en ĉiu el tiuj aranĝoj vidas eventojn kaj "grandajn sukcesojn". La vero tamen estas alia kaj ni almenaŭ aludu ĉi tie pri ĝi.

Escepte de la Internaciaj Junularaj Kongresoj de TEJO, la solaj internacie sukcesaj kaj prestiĝaj junularaj aranĝoj dum la lastaj du jardekoj estis la Internaciaj Seminarioj de Germana Esperanto-Junularo. Pluraj sesioj de tiu moderne konceptita aranĝo, tiel laŭ la nombro de partoprenantoj kiel laŭ la kvalito de siaj programoj, plurfoje superis Internaciajn Junularajn Kongresojn kaj povis tute trankvile adopti la nomon "Internacia Vintra Universitato". La Internaciaj Seminarioj de GEJ pioniris sur la kampo de la aranĝado de kunvenoj en kiuj Esperanto ne plu estis la temo sed nur rimedo de la diskutoj, la komunikilo.

Ĉi-jare okazos la 18a sesio de la "Internacia Vintra Universitato", la 18a Internacia Seminario de GEJ. Ĝiaj datoj estas tradiciaj — ĉiam dum la jarŝanĝaj tagoj — inter la 27a de decembro 1974 kaj la 3a de januaro 1975. La loko: Paderborn, situanta inter Kassel kaj Münster kaj dum la lasta tempo minacanta fariĝi la centro de la Esperanta aktiveco en FR Germanio. La temo de la 18a IS de GEJ estos: "Natursciencoj —

ĉu nur por fakuloj?". Oni planas trakti la temon en pluraj laborgrupoj, kiujn gvidos junaj sciencistoj. En du apartaj diskutrondoj oni okupiĝos pri jenaj temoj: "Ekstera agado — kial, kiel, kien?" kaj "Organizado de esperantistaj renkontiĝoj".


Pro la fakto, ke la Internaciaj Seminarioj de GEJ ĝuas renomon ankaŭ ĉe la oficialaj ekstermovadaj instancoj, la aliĝkotizoj ĉiam estis tre favoraj, kio okazos ankaŭ kun la sekvanta IS: Oni pagas inter 85 kaj 100 germanajn markojn (depende de la aĝo) kaj tio inkluzivas ĉion. Al difinitaj kategorioj de la partoprenantoj oni antaŭe kutimis repagi parton de la vojaĝelspezoj, sed en la ĉi-jara informilo oni ne mencias tion. Aliĝi oni povas ĉe: Eberhard Schlumberger, Neuffenstr. 7, D-7920 Heidenheim, FRG, antaŭpagante 10 GM al: poŝtĉekkonto Dortmund 1118 71, Germana Esperanto-Junularo, Internaciaj Seminarioj, Maikammerer Str. 21, D-6731 Sankt Martin, FRG. Informojn oni petu ĉe: Hermann Behrmann, Bahnhofstr. 54, D-4972 Löhne 1, FR Germanio.

La 31a IJK, kie?

EN LA OKTOBRA NUMERO de nia revuo (p.171), ni publikigis informon, laŭ kiu la sekvanta Internacia Junulara Konferenco de TEJO "verŝajne okazos en la dana urbo Herning". Intertempe montriĝis, ke tio estis pli "ŝajna" ol "vera", ĉar la kombino kun Herning komplete forfalis. La dana sekcio de TEJO, Dana Esperanto-Junularo, ankoraŭ ne sukcesis fari firmajn interkonsentojn pri la loko de la 31a IJK. Ni disponas pri informoj, laŭ kiuj oni serioze traktas la eblecojn, ke la Konferenco okazu en Fredericia, la centra trafiknodo de Danlando. Tamen, ankaŭ tio estas momente nur "verŝajna", sed ni esperas, ke ni en la decembra numero de la revuo povos informi vin pri la definitiva scenejo de la junulara ĉefaranĝo por 1975.

JET aŭ TEJ?

Ricevinte ĉi tiun foton de s-ro A. Berka, prezidanto de IKUE-sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ni iom konfuziĝis pro la ligna tendara nomo, en la triangulo, apud la stelo. Kvankam sendube temas pri mallongigo de Junulara Esperanto-Tendaro, fotita de malĝusta flanko, ni lasis la iom kuriozan nomon TEJ por konformigi la bildon al ĉi tiu paĝo. JET aŭ TEJ — ne gravas, ĉefe estas, ke ĉi-somere en Herborkce, Ĉeĥoslovakio, funkciis la kutima Esperanta tendaro, kiu kunvenigis plejparte gejunulojn. Dum 12 tagoj, en la kadro de la aranĝo funkciis entute 9 diversgradaj kursoj de la Internacia Lingvo.. La tendaron gvidis s-ro M. Švaček.



Finnlando

• Popoldemokrata parlamentano, Ana-Lisa Jokinen, faris en septembro argumentitan proponon, ke la ŝtata buĝeto por 1975 enhavu 30000 markojn kiel subvencion al Esperanto-Asocio de Finnlando. Ŝi atentigis, ke ĝis la fino de la Dua Mondmilito, dum pli ol dudek jaroj, la landa Esperanto-movado regule ricevis monhelpon el la buĝeto de la finna ŝtato.

Belgio

• Lige al la turisma aranĝo, la 7an de septembro 1974 en Bruselo, unu el la organizintoj de la t.n. "Tago de la Esperanto-Filmo", s-ro L. de Bruyne, sukcesis interesigi pri ĝi la belgan televidon (nederlandlingvaj programoj). La rezulto estis 35-minuta televida programo pri Esperanto, kiun konsistigis intervjuoj kun: s-ro Jo Haazen (artisto), d-ro W. de Smet (sciencisto), f-ino K. Lödör (instruistino) kaj s-ro L. de Bruyne (teknikisto). Krome, antaŭ la turisma aranĝo okazis sukcesa gazetara konferenco, kiun prizorgis s-ro G.C. Fighiera.

Germana Dem. Respubliko

• En ĉeesto de pluraj eminentuloj, la 7an de oktobro en Rostock okazis festa kunveno de la loka filio de Kulturligo de GDR (Esperanto-laborgrupo). Dum la aranĝo, kiun ĉeestis kvindek da personoj (inter kiuj ankaŭ pluraj gastoj el la proksima pola urbo Szczecin), parolis s-roj R. Graetz (Aktualaj problemoj de la internacia Esperanto-movado) kaj D. Blanke (Laborista Esperanto-movado). Dum la solenaĵo, s-ro R. Graetz, kiu iam aktivadis en ĉi tiu urbo (kiel esperantisto), transdonis al la loka grupo la Esperanto-flagon, kiun li kaŝis en la jaro 1933 pro la tiamaj hitlerismaj persekutoj.

FR Germanio

• Laŭ informo de *Pilo-Press*, lastatempe en Paderborn almenaŭ 200 infanoj lernas Esperanton. Krome, ekde la mezo de septembro tie aktivas ankaŭ s-ro August Weide, kiu en la relative malgranda loko sukcesis disdoni pli ol 7000 informilojn pri la Internacia Lingvo. Fine de septembro, ĉe la popola altlernejo de

Paderborn komenciĝis la unua kurso kun trideko da partoprenantoj. La kurson gvidas s-ro Weide. En Paderborn baldaŭ okazos GEJ-seminario.

Francio

• Laŭ informo de nia kunlaboranto, s-ro L. Giloteaux, lige al la 70a datreveno de la Unua Universala Kongreso, en Boulogne-sur-Mer, la 3an kaj 4an de majo 1975, okazos internacia markola Esperanto-renkontiĝo, kies programo antaŭvidas memorsolenaĵon sur la loka Placo Zamenhof.

• La Kultura Asocio de la Kastelo Grésillon entreprenis la konstruon de granda salono por prelegoj kaj kursoj. Tiucele estas lanĉita monokolekta kampanjo, kiu bonvenigas kontribuantojn de minimume 5 francaj frankoj (poŝtĉekkonto 2.512.77, Nantes).

Brazilo

• "Bona Espero", eduka centro esperantista, norde de la ĉefurbo Brazilio, lanĉis kampanjon por plivastigi sian agadon. Por personaj kontaktoj kun parlamentanoj kaj ministeriaj instancoj kaj per alvoko al brazilaj esperantistoj, oni klopodas akceli la starigon de agrikultura gimnazio por pli racie utiligi la riĉaĵojn de la regiono. "Bona Espero" kovras la areon de ĉ. 14 000 km² en ideala subtropika klimato, je la alteco de 1400 m super la marnivelo.

• Laŭ *Jornal do Brasil*, la federacia deputito Nina Ribeiro pledis en la brazila parlamento por la enkonduko de la portugala kiel oficiala lingvo en Unuiĝintaj Nacioj, argumentante, ke ĝin parolas 250 milionoj da personoj en pluraj kontinentoj. Kvankam la nombro uzita de la influhava brazila deputito ŝajnas esti iom troiga, la portugala okupas la kvinan lokon en la mondo laŭ la nombro de siaj uzantoj.

Svislando

• Kultura Centro Esperantista, sendube la plej vigla inter la svisaj Esperanto-organizaĵoj, anoncas la translokiĝon de sia sekretariejo. La nova adreso de KCE estas: Postiers 27, CH -2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando; telefono: (039) 26 74 07.



De la 22a ĝis la 28a de septembro 1974, en Magliaso, apud Lugano en Svislando, okazis la 15a Eŭropa Feriosemajno. En la aranĝo, kiun organizis svisaj fervojistoj, partoprenis 87 personoj el 11 landoj. La instrua parto de la programo enhavis tri paralelajn Esperanto-kursojn, el kiuj tiun por komencantoj (sur la foto) gvidis s-ro Bächli.



Hispanio (v. la foton ĉi-supre)

• Antaŭ nelonge, la loka grupo de Las Palmas en Kanariaj Insuloj aranĝis sukcesan ekspozicion pri Esperanto. Pri la aranĝo, kiu allogis mul-

tajn vizitantojn, dufoje raportis la loka televido kaj plurfoje tri regionaj ĵurnaloj, el kiuj unu aperigis longan intervjuon kun la tiea UEA-

delegito, s-ro Sarmiento Domínguez, la aranĝinto de la ekspozicio. Dum la lasta jaro, s-ro Domínguez sukcesis aperigi en la gazetaro de Kanariaj Insuloj preskaŭ dek priesperantajn artikolojn.

Israelo

• La komitatano de UEA, s-ro J. Giladi, informas, ke post la aperigo de favora artikolo pri Esperanto en la ĵurnalo *Haarec* (artikolo tradukita el la usona *New York Times*), al lia anonceto pri koresponda kurso per aliĝo reagis 40 novaj kursanoj.

Nov-Zelando

• Inter la 7a kaj 10a de oktobro ĉi-jare, en la ĉefurbo Wellington, okazis la unua oficiala Esperanto-kurso por instruistoj. La nacia Eduka Fakto (ministerio) subtenis la kurson, kies celo estis provizi instruistojn por eksperimentaj klasoj de la Internacia Lingvo, kiujn oni planas por 1975 kaj kiujn subtenos la sama ministerio, preta kunhelpi ankaŭ en la ellaboro de taŭgaj kursmaterialoj. Oni planas plurajn similajn kursojn dum la sekvantaj monatoj.

Fake

Aŭtomobilistoj

• IEKA (Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista), kunlaboranta faka asocio de UEA, jam delonge okupiĝas pri la faka terminaro en la Internacia Lingvo. Kvankam tiuj laboroj ankoraŭ ne estas kompletigitaj, parto de la materialo estis utiligita por aldoni la esperantlingvan sektion al la plurlingva aŭtomobilista terminareto, kiun presigis FIAT, disponigante 2 500 ekzemplerojn al la 59a UK en Hamburgo por senpaga disdono al la kongresanoj.

Bahaismo

• Ĉe la Usona Bahaa Konferenco en St. Louis, komence de septembro ĉ.j., la Bahaa Esperanto-Ligo havis apartan informan budon, kiun vizitis inter tri kaj kvar mil personoj. Estas interese, ke en la sama aranĝo aperis ankaŭ propagandistoj de Interlingua, Ido, Anglo-Lat kaj kelkaj aliaj "planlingvoj", en komuna budo (! ?), sed la interesiĝo pri tiuj "lingvoj" ne estis aparte granda.

Muziko

• La dirigento de la mondfama Koncerteja Orkestro de Amsterdam, laŭ intervjuo en la nederlanda ĵurnalo *Algemeen Dagblad* (1974 10 02), rifuzis inviton gaste diriĝi en Moskvo, "ĉar la lingvo estas multe tro granda barilo. Oni ja tuj diris, ke mi kompreneble ricevus interpretiston, sed kontakto kun orkestro estas multe tro persona afero por ke ĝi estu plenumbla en tia maniero."

Lernolibroj

• *Esperanto programita* de Hermann Behrmann minacas starigi apartan rekordon de populareco inter la lernolibroj de la Internacia Lingvo. Post la tradukoj el la germana originalo en la anglan kaj nederlandan, nun estas presata la sveda traduko, kiun pretigis Ulla Luin, Åke Näsholm kaj Rolf Hallrin. Bele prizorgita (F. Luin) prospekto kun la 1-a leciono jam aperis kaj estas vaste distribuata.

Eldona aktiveco

• La eldonisto J. Régulo, kies eldonaĵoj sub la marko "Stafeto" prezentas la plej prestiĝan postmilitan kolekton de la Esperanta literaturo, en Hamburgo anoncis siajn planojn ĉesi la eldonan aktivecon. Malgraŭ liaj insistaj dementoj, pluraj emis ligi tiun anoncon al la hamburgaj ŝanĝoj en UEA. Ke tiu ligo ne ekzistas definitive pravas lastatempaj informoj, laŭ kiuj la eldonisto faris novajn favorajn kontraktojn, kiuj komplete malaktualigas lian hamburgan anoncon. Al ni estas konate, ke oni baldaŭ povas atendi pliajn volumojn sub la marko "Stafeto".

Urba trafiko

• La entreprena gazeto *ZET*, en Zagreb, Jugoslavio, jam 15 jarojn enhavas monatan rubrikon en Esperanto, en kiu la iama redaktoro de la gazeto, Zvonko Rehoříć (Radnički dol 52/III, YU-41000 Zagreb), resumas la plej gravajn nacilingvajn artikolojn. Pere de Esperanto funk-

cias ankaŭ la nacilingva rubriko "Tra la mondo", al kiu kontribuas eksterlandaj esperantistoj, skribante pri novaĵoj en la urba trafiko de siaj landoj. Inter la plej diligentaj kontribuantoj troviĝas H.D. Palmer el Bristol, Britio.

Turismo

- Inter la 22a kaj la 24a de novembro, en Bydgoszcz (Pollando), "Juventur", pola agentejo por la internacia junulara turismo, organizas la unuan "Turisman Esperanto-foiron". La programo de la aranĝo, al kiu estas invitataj delegacioj de la najbaraj landaj asocioj, reprezentantoj de la 60a UK en Kopenhago kaj la 31a IJK en Danlando, antaŭvidas subskribon de kontraktoj pri internaciaj turismaj aranĝoj de polaj esperantistoj en la jaroj 1975 kaj 1976.

Lingvistiko

- En la nova socilingvistika volumo (590 paĝoj), kiun redaktis J.A. Fishman kaj eldonis Mouton sub la titolo *Advances in Language Planning* (Progresoj en lingvoplanado), kunlaboris ankaŭ du esperantistoj: D. Barnes (Lingvoplanado en la kontinenta Ĉinio) kaj la nova aganta

direktoro de CED, D-ro J. Pool (Amas-opinio pri lingvo-politiko: la kazo de Kanado).

Mondfederaciismo

- Post plurjara neaktiveco, lastatempe oni denove faras klopodojn revigligi Universalan Ligon, pacifistan organizaĵon, kiu iam ludis gravan rolon en la Esperanto-movado. Depost majo ĉi-jare aperis tri numeroj de modesta bulteno, kiu anoncas la reaktiviĝon de la organizaĵo kies nova centro troviĝas en Nederlando (Postbus 334, Bussum-1351). Estas interese, ke inter la novaj aktivuloj de Universala Ligo troviĝas denove s-ro Andreo Cseh, kiu en septembro 1975 fariĝos 80-jara.

Kultura agado

- La religia movado Oomoto, kun sidejo en Kameoka (Japanio), dum la lastaj jaroj aktiviĝis en Eŭropo kaj aranĝis plurajn artajn ekspoziciojn, pri kio ni jam skribis en la julia/aŭgusta numero de nia revuo (p. 129). Baldaŭ estos inaŭgurita nova tiaspeca ekspozicio en la belga urbo Gent. Krome, Oomoto lastatempe lanĉis ankaŭ fondiĝon de aparta kultura asocio "Oomoto-Amikaro" (20, rue Olivier Noyer, F-75014

Paris, Francio), kies celo estas "diskonigo de la tradicia japana kulturo en Eŭropo". Simile al Oomoto mem, ankaŭ la nova asocio statute fiksas la uzon de Esperanto en siaj internaciaj rilatoj.

Psoriazo

- UEA-delegito en Hastings, Sussex, Britio, s-ro Kenneth J. Hadler, iniciatis pere de Esperanto la fondiĝon de tutmonda organizaĵo, kies celo estas kunligi la suferantojn de psoriazo (neinfekta haŭtmalsano). La nova organizaĵo sukcesis starigi jam kontaktojn kun kvindek da esperantistoj en 20 diversaj landoj. Universala Psoriazo-Asocio, kiel nomiĝas la nova organizaĵo, estas la unua provo de internacia kunligiĝo en tiu fako. Kiel ĝia oficejo funkcias la sidejo de la brita samfaka organizaĵo: The Psoriasis Association, 22 Billing Rd., Northampton, NN1 5AT, Britio.

Radio

- Oni faras klopodojn ĉe Radio Budapest, por ke ĝi restarigu siajn disaŭdigojn en la Internacia Lingvo. Skribu leteron aŭ pk. al Radio Budapest, Bródy Sandor u. 5-7, H-1800 Budapest, petante regulajn disaŭdigojn en Esperanto.

Persone

Aisberg

- Inĝ. E. Aisberg, pri kiu ni skribis en la maja numero (p. 97), antaŭ nelonge vojaĝis al Odeso, Sovet-Unio, kaj tie renkontiĝis kun Sergej Rublov, unu el la plej konataj figuroj en la soveta Movado inter la du mondmilitoj, iama membro de CK kaj de la Lingva Komisiono de SEU.

Harry

- La restado de la aŭstralia ambasadoro en Bonn, s-ro Ralph Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, en Karakaso (Venezuelo), kie li estris sialandan delegitaron en la Internacia Konferenco pri la Marjuro, rezultigis plurajn intervjuojn en la tiea gazetaro. Kiel kutime, s-ro Harry amplekse emfazis ankaŭ sian aktivecon en la kampo de la Internacia Lingvo. Venezuelaj gazetoj lastatempe aperigis favorajn artikolojn pri Esperanto.

Régulo

- Prof. Juan Régulo Perez, dumviva membro de UEA, kiu, malgraŭ la ekŝiĝo pri kiu vi legas aliloke en ĉi tiu numero, plue restas fakdelegito pri romanida lingvistiko, donis preskaŭ tutpaĝan intervjuon pri Esperanto al la loka gazeto *La Tarde* en La Laguna, Kanariaj Insuloj. Kiel prof. Régulo mem skribis, temas pri "kutima" intervjuo antaŭ la komenciĝo de la nova studjaro en la loka Universitato, kie li, interalie, funkcias ankaŭ kiel katedra profesoro pri Esperanto.

Kutas

- Multjara gvidanto de Hungara Esperanto-Asocio, s-ro Bela Bercei, komence de oktobro ĉi-jare, pro malsano retiriĝis de la funkcio de la ĉefsekretario de HEA. La nova ĉefsekretario de la hungara landa asocio de UEA fariĝis s-ro Imre Kutas (sur la foto), kiu la Internacian Lin-



gvon lernis jam antaŭ plurdeko da jaroj, sed aktiviĝis en la Movado nur lastatempe. S-ro Kutas estis elstara figuro en la hungara diplomatio kaj dum 25 jaroj servis kiel ambasadoro en diversaj okcidenteŭropaj ĉefurboj.

N-ro 483, 1974 - 09 - 30

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-01-15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos la nomigo fariĝos valida.

FINNL: Sakari Kauppinen, JD Tampere. FRG: Uwe Joachim Moritz, FD Stolberg. KOR: Zeongho Lee, VD kaj Seong-Ĉung Jeong, JD Seoul. MEKS: J.M. Claramunt, FD México. PORT: Luis Lazaro, D, JD, FD Lisboa. SOV: Ivan S. Varjuhin, FD Rostov-Don. US: G. Rodenborn, D Piedmont.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto.

BELG: Verviers, D kaj FD (horloĝoj/juvelarto). BRIT: Bangor, FD (studentaj aferoj); Brentwood. FRG: Alsdorf. HISP: Calella; La Laguna, D. JAP: Kameoka, JD. KOR: Seoul, JD. KUBO: Sagua la Grande. NED: Bussum, FD (komerco/industrio). URUGV: Montevideo FD (edukado).

DONACIOJ 1974 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Urugvajo:s-ino H.R. de Sonnenfeld 2670,11. Sumo ĝisnuna 4797,33.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 3,59. Nederlando: Paul Rijs 8,67. Svedujo: Erik Carlén 100,—. Sumo ĝisnuna 152,62.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: G.S. Sack 2,39. Nederlando: E. Burg 2,50. Sumo ĝisnuna 2526,54.

ĜENERALA KASO: Anonime: 1000,—. FR Germanio: F. Epstein 995,—; F. Lowitzer 2,50; R. Schleske 4,—; Maria Vogel 13,43. Svedio: S. Fjordland 60,24. Usono: A. Hughes 16,22. Sumo ĝisnuna 4131,54.

TEJO Patronaj Membroj A: 20 M. Landmark, Norvegio; 21 Cesare Arieti, Italio; 22 Uwe J. Moritz, FR Germanio.

PROPAGANDA KONTO: Francio: M. Antoinette Eyssautier 190,—. Sumo ĝisnuna 750,96.

FONDAĴO TEJO: Anonime 11,23. FR Germanio: Kristana Esperanto-

Grupo, Stuttgart 5,25. Sumo ĝisnuna 7497,71.

NOMITA PERANTO POR SUD-VJETNAMIO

Konforme al la art. 16 de la Ĝenerala Regularo de UEA, la direktoro de la C.O. nomis kiel Peranton de UEA por Sud-Vjetnamio la Sajgonan Esperanto-Grupon. Tiel ĝi fariĝis la kvara landa oficejo de UEA en Azio. La kotizoj fiksitaj en vjetnamaj pias-troj aperis en la oktobra numero. Adreso: Sajgona Esperanto-Grupo, 386/43 Truong-minh-Giang, Sai-Gon 3.

PRI NOVA ELEKTO DE KOMITATANOJ B

Kiel raportite aliloke en ĉi tiu numero de la revuo, prof. Juan Régulo Pérez ekŝiĝis el sia ofico de komitatano B de UEA. Tio signifas, ke nun vakas kvar lokoj por komitatanoj B, anstataŭ tri (kiel indikite en la septembra numero, paĝo 149). La direktoro de la Centra Oficejo ripetas la inviton al la ĉefdelegitoj kaj delegitoj (tio ĉi ne koncernas la vicdelegitojn kaj la fakdelegitojn) sendi proponojn pri kandidatoj **antaŭ la 1-a de januaro 1975**. Konforme al la Ĝenerala Regularo de

UEA, necesas skriba konsento de ĉiu kandidato. Por ke kandidatigo estu valida, necesas, ke la kandidato estu proponita de kvin ĉefdelegitoj aŭ delegitoj. Al la proponoj oni bonvolu aldoni koncizajn biografiojn de la kandidatoj. La proponojn bonvolu sendi al la adreso de la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

EVITU PAGI PERE DE BANKO!

Kiel ni jam anoncis (lasta kovrilpaĝo de la julia/aŭgusta numero), la bankkostoj en Nederlando nun estas **minimуме 5 guldenoj** por ĉiu unuopa pago el eksterlando, iel tra banko farita. Por ŝpari monon al vi kaj UEA, prefere sendu viajn pagojn pere de la internacia poŝta ĝirsistemo aŭ, se tia ebleco ne ekzistas, pere de internacia poŝtmandato. Niaj membroj en Britio, Francio, Svislando kaj Svedio povas uzi specialajn kontojn de UEA en tiuj landoj (v. la Jarlibron). Se vi tamen devas uzi la bankajn pagvojojn, evitu tiamanieran sendon de malgrandaj sumoj, ĉar la bankkostoj por ĉeko de 10 aŭ 100 dolaroj estas egalaj — po 5 guldenoj. Se vi deziras ofte mendi ekzemple librojn, pagi abonojn k.s. pere de UEA, estas konsilinde starigi kreditan konton je via nomo per unufoja sendo de iom granda sumo.

Vi povas helpi la laboron de UEA

pagante akurate vian membrokotizon de UEA por la venonta jaro. Kotizojn oni prefere ĉiam sendu al la koncerna landa kotizperanto (vidu la adresojn en la Jarlibro), ĉar ankaŭ tio simpligas la laboron de la Centra Oficejo. Se en iu lando ne ekzistas peranto, oni bonvolu pagi rekte al Rotterdam. Kotiztabelo por la jaro 1975 aperis en la oktobra numero de ĉi tiu revuo.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.



Serĉas kontaktojn kun dentteknikistoj: M. Kossolobow, 1 Berlin (West) 19, Tapiauer Allee 2, Okcidenta Berlino.

Bukedo, 3 kajeroj de 37, 33, 31 kantoj (muziknotoj kun Esperanto-tekstoj). Tria kajero laŭ vortoj de Heinrich Heine. Muziko originale komponita de prof. V. Heimlich. Prezo, inkluzive sendokostojn, registrite, 4 usonaj dolaroj por ĉiu kajero. Pago al: Bank Leumi Le-Israel, kontonumero 101/090005/08, Hof Hašaron Branch, Herzlia Pituah, Israelo.

Pri libroj, broŝuroj, revuoj, kajeroj rilate pentroarton, lignajn kaj metalajn gravuraĵojn, skulptaĵojn ktp. interesiĝas Luis Vicino, Maza 1450, Buenos Aires 36, Argentino. Rekom-pence sendos argentinajn neuzitajn poŝtmarkojn.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Āmosevej 5 A, DK-2700 Kōbenhavn, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Letervesperon aranĝos, la 15an de decembro 1974, okaze de la tria datreveno de sia fondiĝo, Esperanta rondeto, CS-95194 Hostie okres Nitra, Ĉeĥoslovakio. Skribu amase! Ni certe respondos.

Dum nia 23-jara agado la kontakto kun multaj interesuloj bedaŭrinde rompiĝis. Koncernaj personoj ĉiam bonvenaj denove skribi al: Esperanto-Misio, S-694 02 HALLSBERG 2, Svedujo.

Korespondemuloj! Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kun-sendu vian foton. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por sen-paga aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj. Kaptu la okazon!

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Donacu al viaj geamikoj la novan kaj allogan lego-libron AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO, kiu enhavas 2000 konversaciajn frazojn, parol-turnojn, didaktikajn demandojn kaj respondojn, kaj 20 tutpaĝajn ilustraĵojn. Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) gld.; sendo-kostoj: 10%. Mendu ĉe via-landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Librojn kaj broŝurojn elĉerpitajn proponas al vi je favoraj prezoj, el sia kolekto de duoblaĵoj, la Biblioteko Hodler de UEA. Petu liston kaj kondiĉojn ĉe: Biblioteko Hodler, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Filatelistoj! UEA povas liveri al vi kolekton de poŝtmarkoj de preskaŭ ĉiu ajn lando aŭ temo je du trionoj de la efektiva kataloga prezo. Minimuma mendosumo: 10 guldenoj. Sendu vian mendon, prefere kun samtempa pago, al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono kompletan liston de siaj programoj.




VERKO, KIUN DEVUS STUDI ĈIU AKTIVA MEMBRO:

POR PLI EFIKA INFORMADO

artikolserio de Ivo Lapenna unue publikigita en la revuo *Esperanto*, eldonita de la Informa Fakto de UEA kiel 20-paĝa bele ilustrita broŝuro plenŝtopita per praktikaj konsiloj ĉerpitaj el la multjaraj spertoj de la aŭtoro sur la kampo de informado.

Prezo: 2,25 (por Nederlando 2,34) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Rabato por kvantaj mendoj.



D-RO NASSIF ISAAC

**LA SENMORTA
KAJ
LA SENVIVA**

D-ro Nassif Isaac

**LA SENMORTA
KAJ
LA SENVIVA**

Prezo: 10 internaciaj
respondkuponoj
aŭ 6,— guldenoj
(por Nederlando 6,24)

Mendebla ĉe UEA

SUBTENU

60a Universala
Kongreso
de Esperanto
Kopenhago
26.7-2.8 '75



la 60-an (jubilean)
Universalan Kongreson
de Esperanto, uzante sur
viaj korespondaĵoj la
allogan trikoloran
glumarkon!

100 markoj kostas,
inkl. sendokostojn,
5,50 gld. (por
Nederlando 6,— gld.).
Mendu ĉe UEA.

Ĉina monata gazeto en Esperanto

El Popola Ĉinio

varbas abonantojn de 1975

Abonprezoj:

1-jara	6,— gld.
2-jara	9,— gld.
3-jara	12,— gld.

(Por Nederlando
aldoniĝas enlanda
imposto 4%)

Abonu ĉe:

UEA, Nieuwe
Binnenweg 176,
Rotterdam-3002,
Nederlando
(pĉk 37 89 64)



aŭ rekte ĉe la Esperanta sekcio de
GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.


Bonvole abonigu ankaŭ viajn amikojn.
Senpagaj specimenoj akireblaj laŭ peto.

ĴUS APERIS

JUDOJ SEN MONO, romano de M. Gold pri judoj enmigrintaj en Usonon kaj pri iliaj obstakloj. Unu el niaj plej interesaj libroj. 224 pĝ. 25,— dkr. (9,90 gld.)

ANNI KAJ MONTMARTRE, originala romano de R. Schwartz kun enkonduko de Hauptenthal, represo. Plezure legebla, kerne Esperanta, facilflua kaj ridige sprita. 128 pĝ. 20,— dkr. (8,10 gld.)

VERDKATA TESTAMENTO, ankaŭ de R. Schwartz, altkvalita poemaro humorplena i.a. el la Esperanta kabareto "Verda Kato" (Parizo). Schwartz estas la humoristo de la Esp-aj verkistoj. 126 pĝ. 20,— dkr. (8,10 gld.)



VERDA ROBO, moderna romano de J.H. Rosbach (96 pĝ) pri diversaj homoj kiuj renkontiĝas en feria hotelo en norvega montaro, kie ili konversacias kaj diskutas pri aĝo, amo kaj arto. Sed subite oni konstatas, ke malaperis valoraj, ŝtrumpoj kaj . . . verda robo. 30,— dkr. (12,— gld.)

ROSEROJ, 48-paĝa melodiario de Ramona van Dalsem, la konata nederlanda Esp-kantistino. Ĝi meritas same multe da aplaŭdo kiel ŝia unua, "Simplaj Floroj". 12,— dkr. (5,40 gld.)


KANTU KUN RAMONA, tekstlibreto de ambaŭ ŝiaj melodiarioj: 10 kantoj de "Simplaj Floroj" kaj 12 de "Roseroj". Per ĝi oni povas aranĝi klubvesperan programon por lerni la belajn melodiojn de Ramona van Dalsem. 22 pĝ. 3,50 dkr. (2,70 gld.)

Mendu la librojn ĉe la libroservo de via lando, aŭ ĉe UEA aŭ ĉe la eldonejo

DANSK ESPERANTO-FORLAG, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Danlando.

Petu la librokatalogon de la eldonejo (senpage).

Rimarko: Mendante ĉe la Libroservo de UEA bv. aldoni 10% por la sendokostoj, kaj nederlandanoj, krome, 4% por la enlanda imposto.



Jam aperis n-ro 3
kun tre varia
enhavo, ilustrita.
Aĉetebblas ankaŭ
n-roj 1 kaj 2.
52 paĝoj, 22cm.
Prezo: po 5 gld.
Mendu ilin ĉe
UEA kaj ankaŭ la
jenajn verkojn
eldonitajn de
Argentina Espe-
ranto-Instituto:
**LA KRIMO DE L'
MILITO** (212p.;

prezo: 9 gld.); **KALEJDOSKOPA VARIETEO**
(prozo kaj poezio de Ergoto, 160p. 9 gld.);
JUNULEJO kaj **LA BUĈEJO** (128p. 9,54 gld.),
NIAJ PLEJ GRANDAJ VERKISTOJ (de Espe-
ranto), **EKFLORADO ĈE PLATA RIVERO**
(112p. 7,50 gld.), **LAŬTEMA VORTARO** (Es-
peranto-angla-franca-hispana, 234p. 10,20 gld.),
BONHUMORA INJEKTILO (120 amuzaj anek-
dotoj kaj spritaj dialogoj de Ergoto de Bonaero,
192p. 12,75 gld.), **LA FRIPONETO DE TOR-
MES** (pikareska novelo, 72p. 6,36 gld.).

REVENIS KRUKO KAJ BANIKO EL Bervalo

ĴUS APERIS la dua eldono de la jam
(fi)fama anekdotaro de Louis Beaucaire.

Tiu vigle ilustrita originala ridincitilo kun
la subtitolo "Maldecaj anekdotoj por
neprudaj legantoj", tiel furoris tra la
mondo, ke la unua eldono el 1970 jam
post nuraj ses monatoj estis havebla nur
prunte aŭ ŝtele.

Prezo: 16,— (por Nederlando 16,64) gld.
Mendu ĉe UEA aldonante 10 procentojn
por la sendokostoj.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 54 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 18 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 370 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska